

ESPERANTYSTA POLSKI POLA ESPERANTISTO



Krakovo. Kongresa Akceptejo, str. Podvale.

„Esperantysta Polski“

W ROKU 1912

wychodzi regularnie co miesiąc w nieco zwiększonej objętości o rozszerzonym programie.

Roczna prenumerata z „Dodatkim literackim“ 2 rb. 50 k. z przesyłką pocztową.

ADRESO: Warszawa, de Redakcio—Włodzimierska 8. Administr.—Hoża 20.

„Pola Esperantisto“

EN 1912 JARO

aperadas ĉiumonate en pligrandigita amplekso kun plivastigita programo kaj „Literatura Aldono“

Jar-abono kun la „Literatura Aldono“ rb. 2.50 = 2.65 kun poŝta frasendo.

„ANTAVUEN KUN KREDO!“

Literatura Jarlibro de „P. E.“ por 1911 jaro.

La prezo de bela 200 paĝa volumo estas: por abonantoj de „P. E.“ 0,50 Sm.
„ ne-abonantoj 1,00 Sm.

mendebla en la Administracio de „P. E.“, Hoża 20, Varsovio.

La enhavo: *Historiozofio de lingvo internacia* de St. A. Dobrzański; *Mia poŝhorloĝo*, novelo de M. Konopnicka, trad. Kabc; *Pax*, nov. de J. Żuławski, trad. Wł. Grabowski; *Somno-Sierra*, fragm. el „Uragano“ de Wł. Gaŝiorowski, trad. D-ski; *En krepusko*, poezio de Staff, trad. Julian Tuwim; „*La ĝemo de l'vivo*“, el „Pan Graba“, de E. Orzeszkowa, trad. M. Czerwiński; *Libroj de Profetoj*, filozofiaj poemoj de A. Lange, trad. A. Grabowski; *Fabelo pri homo feliĉa*, nov. de J. Żuławski, trad. M. Czerwiński; *Nalo kaj Damayanti*, el sanskrito trad. A. Lange; *Pluvo autuna*, poemo de Staff trad. Julian Tuwim; *En autuna vespero*, nov. de T. Konczyński, trad. E. Gacki; *Defendo de l'honoro*, nov. de Groller, trad. G. C.; *La arlekeno*, nov. de Juliusz Korczak, trad. Bejot; *Al mokantoj*, artikolo de St. A. Dobrzański.

La bela 200 paĝa volumo kun interesa kaj abunda enhavo skribita en perfekta Esperanto devas troviĝi en biblioteko de ĉiu amanto de nia lingvo kaj literaturo.

Aperis:

La Negro

Kvarakta dramo de St. Przybyszewski (Pšibyševski) trad. T. Ficovski. dissendata al

ĉiuj abonantoj de „Pola Esper.“ kiel aldono por unua duonjaro de 1912 jaro.

La prezo 50 kop.

Od Administracji „Esperantysty Polskiego“.

Uprasza się pp. prenumeratorów o zawiadomienie Administracji „Esp. Pol.“ (Hoża 20) o zmianie adresu. Nieregularny odbiór pisma bywa prawie wyłącznie skutkiem niezakomunikowania nowego adresu.

Čłonkowie „Pols. Tow. Esp.“ (Warsz.), żyćzący sobie w 1912 roku otrzymywać „Esp. Pols.“ raczą go zaabonować w naszej Administracji (Hoża 20), lub za pośrednictwem księgarń. Prenumerata roczna wynosi 2 rb. 50 kop. wraz z „Dodat. Liter.“

Ze wszelkimi reklamacjami prosimy zwracać się tam, gdzie została opłacona prenumerata. Administracja bezpośrednio przyjmuje reklamacje tylko od tych pp. prenumeratorów, którzy nadesłali swe zamówienia i prenumeratę wprost do Adm. „Esp. Pols.“

Co to jest Esperanto?

Esperanto jest to język sztuczny, gienjalnie rozwiązujący odwieczny problemat języka Międzynarodowego.

Esperanto jest to język dźwięczny, giętki, logiczny i nader bogaty.

Esperanto zdolny jest wyrazić każde pojęcie i najsztubtelniejsze odalenie myśli ludzkiej.

Esperanto jest neutralnym środkiem komunikacji umysłowej dla całej ludzkości.

Esperanto nie ma na celu wyrugowania języków narodowych, lecz ma służyć obok języka ojczystego jako środek pomocniczy w stosunkach międzynarodowych.

Esperanto należy do największych zdobyczy kulturalnych 19 stulecia i ma olbrzymią przyszłość przed sobą.

Esperanto jest dziełem polskiego lekarza D-ra Ludwika Zamenhofs.

Esperanto, jako powstały na ziemi polskiej, przyczynia się do sławy imienia polskiego.

Esperanto daje równouprawienie językowe w stosunkach z narodami uprzywilejowanymi.

Esperanto usuwa przeszkody w obcowaniu z ludźmi, wynikające z różnojęzyczności.

Esperanto ma gramatykę niesłychanie prostą i łatwą — bez żadnych wyjątków.

Esperanto posiada słownik, składający się tylko z paru tysięcy najbardziej międzynarodowych pierwiastków; każdy inteligentny człowiek zna ich do 50% bez nauki (absolut'a, kultur'o, tendenc'o, aprob'i i t. p.).

Esperanto posiada niezliczoną ilość słów pochodnych, które się tworzą zapomocą 32 sufiksów i prefiksów oraz końcówek gramatycznych.

Esperanto znakomicie nadaje się nietylko do mowy potocznej i korespondencji, lecz i do wszelkiego rodzaju dzieł naukowych i literackich, nie wyłączając poezji.

Esperanto dzięki swemu bogactwu, giętkości i logicznej budowie, doskonale nadaje się do tłumaczeń z każdego języka bez zmiany i spaczenia myśli.

Esperanto nie jest językiem martwym, ponieważ ulega naturalnemu rozwojowi, — nie wolnie jednak, lecz prawidłowo i logicznie, zgodnie z zasadami swej budowy.

Esperanto dzięki swym wyjątkowym zaletom zyskał na całym świecie powszechne uznanie. Instytucje naukowe, znakomici uczeni i myśliciele wypowiedzieli o nim najpochlebniejsze opinie.

Esperanto ułatwia naukę innych języków i przyzwyczajają do analizy językowej i syntezy.

Esperanto obecnie jest już rozpowszechniony o tyle, że niema kraju i miasta, gdzieby nie było esperantystów.

Esperanto szczególniejszym uznaniem cieszy się w najkulturalniejszych krajach, bo — Francji, Anglii, Niemczech i Ameryce.

Esperanto już obecnie daje doraźną korzyść, umożliwiając stosunki z całym światem.

Esperancki tekst można czytać przy pomocy słownika nawet bez znajomości gramatyki; w żadnym innym języku jest to niemożliwe.

Esperanto nadaje się do prowadzenia korespondencji z ludźmi, nieznanymi tego języka; należy tylko do listu dołączyć „Klucz Esperanto“ (efekta (waży 1/4 luta i kosztuje 5 groszy).

Esperanto usunie z czasem potrzebę nauki obcych języków, na co teraz w szkołach nieprodukcyjnie marnuje się tyle czasu i sił; zyskany zaś czas można będzie poświęcić nauce języka ojczystego oraz innych przedmiotów, wzbogacających umysł i wiedzę.

Esperanto ułatwi korzystanie z dzieł naukowych i literackich całego świata, gdyż każde dzieło wybitne wystarczy przetłumaczyć tylko na Esperanto, aby uprzystępnić je dla wszystkich narodów.

Esperanto stale i coraz więcej rozpowszechnia się, jak to dowodzą następujące dane:

Esperanckich towarzystw oficjalna statystyka podaje: w r. 1903 — 108, 1905 — 523, 1908 — 1575, 1910 — 1719.¹⁾

Esperanckich czasopism wydawano w r. 1905 — 22, 1906 — 53, 1909 — 89, 1911 — z górą 100.

Esperancka literatura w r. 1910 liczyła około 2000 tomów dzieł tłumaczonych i oryginalnych.

¹⁾ Z nich „Francuska liga“ liczyła w 1909 r. 8766 członków, a „Esperancki Wszechświatowy Związek“ E. A. z Zarządem w Genewie w tymże roku liczył 7500 członków i posiadał w 872 miastach 618 swych konsulów, 765 delegatów i 296 subdelegatów.

Uczmy się Esperanta!

Kompietna gramatyka języka Esperanto.

a) Alfabet.

A a,	B b,	C c,	Ĉ ĉ,	D d,	E e,
•	•	•	•	•	•
F f,	G g,	Ĝ ĝ,	H h,	Ĥ ĥ,	I i,
•	•	•	•	•	•
J j,	Ĵ ĵ,	K k,	L l,	M m,	N n,
•	•	•	•	•	•
O o,	P p,	R r,	S s,	Ŝ ŝ,	T t,
•	•	•	•	•	•
U u,	U ŭ,	V v,	Z z,		
•	• (krótkie)	•	•		

b) Części mowy.

1) Przedimek jest tylko określony: la, wspólny dla wszystkich rodzajów, przypadków i liczb; nieokreślonego niema.

Przykłady: la homo człowiek, la stelo gwiazda, la maro morze, la libro książka.

2) Rzeczownik kończy się zawsze na o.

Dla utworzenia liczby mnogiej dodaje się końcówka j.

Przykłady: homoj ludzie, steloj gwiazdy, maroj morza.

Przypadków jest dwa: mianownik (przypadek pierwszy, nominativus) i biernik (przypadek czwarty, accusativus); ten drugi powstaje z mianownika przez dodanie zakończenia n.

Resztę przypadków oddaje się za pomocą przymków: de (od), al (do), kun (z), per (przez), lub innych przymków, odpowiednio do znaczenia.

Przykłady: patro ojciec, al patro ojcu, patron ojca (biernik liczby pojedynczej), por patroj dla ojców, patrojn ojców (biernik liczby mnogiej).

3) Przymiotnik kończy się zawsze na a.

Przykłady: kara patro drogi ojciec, kara patrino droga matka, kara infano drogie dziecko.

Przypadki i liczby są te same, co dla rzeczownika.

Przykłady: bonan patron dobrego ojca; junan patrino młodą matkę (bierniki liczby pojedynczej), kleraj homoj świątli ludzie, helaj steloj jasne gwiazdy (mianowniki liczby mnogiej), vi ridis belajn teatrojn widzieliście piękne teatry (biernik liczby mnogiej).

Stopień wyższy tworzy się przez dodanie wyrazu pli (więcej).

a) najwyższy przez dodanie plej (najwięcej); wyraz ni i z tłumaczy się przez ol.

Przykłady: Pli blanka ol nego bielszy niż śnieg, plej pura akvo najczystsza woda.

4) Liczebniki główne nie odmieniają się: unu (1), du (2), tri (3), kvar (4), kvin (5), ses (6), sep (7), ok (8), naŭ (9), dek (10), cent (100), mil (1000). Dziesiątki i setki tworzą się przez proste połączenie liczebników.

Dla utworzenia liczebników porządkowych dodaje się końcówka przymiotnika. Np. unua pierwszy, dua drugi i t. d.

Dla wielorakich — przyrostek obi: triobla potrójny.

Dla ułamkowych — on; duono połowa, kvarono ćwiertć.

Dla zbiorowych — op; kvarope we czworo.

Dla podziałowych — wyraz po; po kvin po pięć.

Prócz tego mogą być liczebniki rzeczowne (unu jedynka, duo dwójka, cento setka) i przysłówkowe (unu po pierwsze, due po wtóre i t. d.).

Przykłady: Kvincent tridek tri (533), du mil kvarcent sesdek du (2462).

5) Zaimki osobiste: mi ja, ci ty, li on, ŝi ona, ĝi ono (o rzeczy lub zwierzęciu — używa się tylko w liczbie pojedynczej); ni my, vi wy (ty), si siebie, ili oni, one, oni zaimek nieosobisty liczby mnogiej.

Zaimki dzierżawcze tworzą się przez dodanie końcówki przymiotnika.

Przykłady: mia mój, moja, moje, via wasz, wasza, wasze.

Zaimki odmieniają się, jak rzeczowniki.

Przykłady: min mnie (biernik liczby pojedynczej), miaj moi, moje (mianownik liczby mnogiej), siajn swoich (biernik liczby mnogiej).

6) Czasownik nie odmienia się przez osoby i liczby. (Np. mi faras ja czynię, la patro faras ojciec czyni, ili faras oni czynią).

Formy czasownika (końcówki:

a) Tryb bezokoliczny ma zakończenie i (fari czynić).

b) Czas teraźniejszy — as (trp. mi faras ja czynię).

c) Czas przeszły — is (li faris on czynił).

d) Czas przyszły — os (ili faros oni uczynią).

e) Tryb warunkowy — us (ŝi farus ona uczyniłaby).

f) Tryb rozkazujący — u (faru czyni, czynicie).

Imiesłowy (odmienne i nieodmienne).

a) Imiesłów czynny czasu teraźniejszego — ant (faranta czyniący, farante czyniąc).

b) Imiesłów czynny czasu przeszłego — int (farinta który uczynił).

c) Imiesłów czynny czasu przyszłego — ont (faronta który uczyni).

d) Imiesłów bierny czasu teraźniejszego — at (farata czyniony).

e) Imiesłów bierny czasu przeszłego — it (farita uczyniony).

f) Imiesłów bierny czasu przyszłego — ot (farota mający być uczyniony).

Wszystkie formy strony biernej tworzą się za pomocą odpowiedniej formy słowa esti (być i imiesłowu biernego danego słowa: używa się przytem przymka de (np. ŝi estas amata de ĉiuj — ona jest kochana przez wszystkich).

7) Przelówki mają zakończenie e.

Stopniowanie podobne jest do stopniowania przymiotników (np. mia frato pli bone kantas ol mi mój brat lepiej śpiewa niż ja).

8) Przymiki (de, al, per, kun i t. d.) rządzą wszystkie przypadkiem pierwszym.

c) Prawidła ogólne.

9) Każdy wyraz czyta się tak jak się pisze.

10) Akcent pada zawsze na przedostatnią zgłoszkę.

11) Wyrazy złożone tworzą się przez proste połączenie wyrazów (główny na końcu). Końcówki gramatyczne uważane są za wyrazy samoistne (np. vaporŝipo parostatek — z vapor' para, ŝip' okręt, o końcówka rzeczownika).

12) Przy innym przeczącym wyrazie opuszcza się przysłówkę przeczącą ne (np. mi neniam vidis — nigdy nie widziałem).

13) Na pytanie do kąd wyrazy przybierają końcówkę biernika, np. tie tam (w tamtem miejsca) Varsovia do Warszawy.

14) Każdy przymiek ma określone, stałe znaczenie; jeżeli należy użyć przymka w wypadkach, gdzie wybór jego nie wypływa z natury rzeczy, używany bywa przymiek je, który nie ma samo-

Jubilea numero.

En Ago — venko nia!

POLA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por propagando de Esperanto



ESPERANTYSTA POLSKI



Miesięcznik poświęcony sprawie Języka Międzynarodowego

Aŭgusto 1912

WARSZAWA — VARSOVIO

Jaro VII — Nro 8 (65)

X X V

1887

1912



D-ro Ludoviko Zamenhof
kreinto de Esperanto.

ANTONI GRABOWSKI.

Jubilea Kantato dedicita al D-ro Zamenhof.



Antoni Grabowski.

*Feliĉa la semanto estas,
Kiu printempe semis grenon,
Kaj en aŭtuno ĝoje festas
De honrikolto la solenon.*

*Feliĉa, kiu en la koro
Pri granda verko flame revis,
Kaj el la ĉarma revo-floro
Maturan frukton elricevis.*

*Arbeto, kiun Majstro kara,
Vi plantis ĉe Vistul'-rivero,
Elkreskis ĝis lazuro klara,
Etendas branĉojn ĉirkaŭ lero.*

*Sub ĝi kolektis terofilojn
La jubile' de nova sento,
Per kiu frate ligas milojn
Neŭtrala lingva fundamento.*

*Krakovaj muroj ĝojresonas,
Dum lernantaro multnacia
Dankeme sian Majstron kronas
Per la verdaĵo laŭrfolia.*

*En niaj koroj, granda homo,
Starigas viaj monumentoj;
La gloron de l' benata nomo
Ripetos ĉiuj la jarcentoj!*

La reveno de l' filo.

(Alegorio)

*Post foresto multejara
Venas filo mia kara;
El migrado ĉiulanda
Venas filo mia, granda!*

*En kabano mankis pano,
Do elmigris li, infano;
Nun revenas beljunulo
Al hejmlando, al Vistulo.*

*Kiel volus mi, patrino,
Premi lin al mia sino;
Doni volus mi festenon
Por saluti la revenon.*


*Vel ne mastras mi kabanon,
Nek liberan havas manon;
Mi, en mia propra domo,
Estas kvazaŭ fremda homo.*

*Ĉar al vi, fratin' pli aĝa,
Post kamplimo hejmvilaĝa,
Brilas, laŭ destino dia,
Stel' alia, pli radia...*

*Do akceptu lin, fratino,
Per muziko kaj per vino!
Li ne vidu ĉe l' festeno,
Kiel premas min ĉagreno.*

• ANTONI GRABOWSKI.

Kantata Jubileuszowa poświęcona twórcy Esperanta
D-rowsi Ludwikowi Zamenhofowi.



Leo Belmont.

*Jakże jest siewca ten szczęśliwy,
 Co posiał ziarno swe na wiosnę,
 Jesienią owoc zebrał z niwy —
 Czci hojnych zbiorów dni radosne!
 O szczęsne serce, które światu
 Niosło w płomiennych snach swe dzieło
 I z czarownego marzeń kwiatu
 Dojrzały owoc rozwinęło!
 To drzewko, które-ś pracowicie
 Nad Wisłą szczepił, Mistrzu drogi,
 Wierzchołkiem buja dziś w błękicie,
 W krąg ziemi cień rozłącza błogi.
 I nowych uczuć dzień święteczny
 Gromadzi pod niem bratnie głowy,
 Erę miłości głosi wiecznej
 Fundament jedni językowej!
 Krakowskie mury rade dźwięczą,
 Kiedy uczniowie z ludów wiele —
 Z wesolą pieśnią laurem wieńczą
 Genjalną skroń Nauczyciela!
 Już w naszych sercach są pomniki
 Błogostawionej Twojej chwały...
 Miłosne na Twą cześć okrzyki
 Stulecia będą powtarzały!*

tłom. z Esperanta
 Leo Belmont.

P o w r ó t s y n a.

(Alegorja).

*Nieobecny wiele lat
 Wraca do dom syn mój drogi;
 Zbiegł sto krajów,—zwidził świat...
 Wielkim wraca w moje progi!
 W chacie było chleba brak—
 Wpędrował jako dziecię;
 Wraca dzisiaj—piękny żak—
 Do rodzinnej Wisły przecie.
 Chciałabym ja—jego mać—
 Garnąć go na moje tonó,
 Chciałabym mu ucztę dać,
 Witać twarz tę powróconą...*

*Lecz, ach! nie mam wolnych rąk,
 By upieścić mego chłopca:
 Tu, gdzie pot mój w skiby wsiąkł,
 W własnej chacie nibym obca!
 Ale tobie zwolił Bóg,
 Starsza siostra i sąsiadko,
 Że blask pada na twój próg,
 Że masz drogę bardziej gładką...
 Więc go przyjmij, siostró ma,
 Wina daj, muzyki boskiej!
 A przez czas, gdy święto trwa,
 Niech nie widzi mojej troski!*

tłom. z Esperanta
 Leo Belmont.

Jubileusz Esperanta.

Dwadzieścia pięć lat upływa od chwili, gdy po raz pierwszy odezwał się na świecie dźwięk mowy esperanckiej.

W towarzystwie prastarej mowy lechickiej przemówił Esperanto najpierw do tych, wśród których powstał, a którzy mu byli najbliżsi...

I rozchodził się odtąd z ziem polskich język esperancki coraz dalej a dalej...

A choć był w skromną — na razie — szatę odziany, chociaż na zewnątrz nie błyszczał przepychem, — wszędzie, dokąd dotarł, znajdował serca i głowy, które go mile przyjęły...

I rozchodził się z ziem polskich coraz dalej a dalej... Niewidzialnemi, zda się, drogami, mniejszemi tysiąckroć od dróg, które wzdłuż i wszerz świat dziś przecinają — przenikał do różnych ludów, wsiąkał w ich świadomość, zapładniał szlachectwem czynu...

Niemi, cieńszemi od pajęczyn, lecz silniejszemi, a nadewszystko skuteczniejszemi od damasceńskiej stali, oplątywał głowy i ręce, zdobywając cnie rzesze lenników, którzy mu chętnie daninę płacić przysięgli.

Dźwiękiem swej mowy połączył w jedną rodzinę całe legiony ludzi, którzy się dotąd czuli obcymi... Wrogów przemienił w przyjaciół, a przyjaciół — w braci...

* * *

W ciągu ubiegłego ćwierćwiecza rósł Esperanto w bogactwo i znaczenie. Co roku szatom jego przybywało świetności i blasku, a sztandarowi — chorążych i towarzyszy... Każdy rok nowy rzucał mu pod nogi coraz to piękniejszą zdobycz, a towarzysze z pod zielonej chorągwi coraz to dalej zapuszczali bezkrwawy swój oręż...

A gdy nadszedł czas świętowania ćwierćwiekowego jubileusza, a w umysłach zaczęło powstawać pytanie, gdzie święcić ów dzień — dało się słyszeć zewsząd jednozgodne wołanie: jedziemy do Polski, jedziemy do kolebki Esperanta!

* * *

Starożytna stolica Polski, Gród Podwa-

welski podejmuje niezwykłych gości. Zjechali na ziemie polskie przedstawiciele wszystkich prawie ludów Europy i Ameryki i wielu synów Azji i Afryki.

Ludzie ci, należący do różnych ras i plemion, wyznający różne religije, przybyli w mury Krakowa z jedną wspólną im wszystkim myślą i z jedną wspólną nadzieją...

Przybyli po to, by radzić nad sposobami szybszego wcielenia w życie swej idei, której oddani są całą duszą.

A przyjazd ich jest zarazem tryumfem Polski, jej wyniesieniem, jej świętem.

Rok 1912 jest bowiem dwudziestą piątą rocznicą narodzin na ziemiach polskich jednej z najżywoźniejszych, aczkolwiek najmniej może odczutyh i zrozumianych przez ogół idei.

I jakkolwiek zjazd taki, jaki się odbywa w Krakowie, nie jest pierwszym tego rodzaju zjazdem, to jednak kongres krakowski zarówno dla sprawy samej, jak i dla Polski, mieć będzie podwójne znaczenie.

Przedstawiciele narodów zarówno tych, które rządzą światem, jak i tych pomniejszych ludów, którym nie sądzono dotąd wystąpić na arenę czy to politycznego, czy to naukowo-artystycznego życia — z rektorami uniwersytetów i akademji oraz z najwyższymi dostojnikami instytucji kościelnych na czele — przybyli do Polski, by złożyć przy sposobności należyty hołd ziemi naszej i jej bohaterom..

* * *

Zgodnie ze staropolską gościnnością Kraków postarał się o to, ażeby goście doznali odpowiedniego przyjęcia, ale zarazem, ażeby mogli, wyjeżdżając od nas, unieść ze sobą w dalekie kraje jaknajmilsze o ziemi naszej wspomnienia, a nadewszystko, ażeby mogli utrwalić w sobie ten szacunek, a nieraz nawet i podziw, jakie posiadli dla nas, zaznając się — za pośrednictwem coraz liczniejszych przekładów esperanckich — z literaturą polską, a tymsamym poniekąd i z życiem naszego narodu.

Zygmunt Greffkowicz.

KAŻDY NOWY ABONENT „ESPERANTYSTY POLSKIEGO“ — TO KROK NA-
PRZÓD W ROZWOJU NASZEJ SPRAWY NA ZIEMIACH POLSKICH.

Parolo de D-ro L. L. Zamenhof

ĉe la malfermo de la Oka internacia kongreso esperantista.

La unuaj vortoj, kiujn mi volas hodiaŭ eldiri al vi, karaj samideanoj, estas vortoj de kora gratulo, ĉar ni havas hodiaŭ grandan feston. Ĵus finiĝis dudek kvin jaroj de la tempo, kiam — post longa naska preparado — aperis publike la lingvo, kiu nin ĉiujn unuigas, por kiu ni ĉiuj laboras kaj kiu enkorpiĝas en si tiun homofratigan ideon, kiun la plimulto el ni havas en sia koro kaj kiu dum dudek kvin jaroj flame instigadis nin labori, malgraŭ ĉia malfacileco kaj ĉiuj malhelpoj.

Dudek kvin jaroj da laborado por Esperanto kaj por ĝia ideo! Tion povas plene kompreni nur tiuj personoj, kiuj partoprenis en tiu laborado de la komenco ĝis nun. Bedaŭrinde tre nemultaj estas tiuj personoj. El la laborantoj de la unua tempo tre multaj jam delonge plu ne vivas, aliajn lacigis la malfacila, granda paciencon kaj persistecon postulanta vojo, kaj ili malaperis el nia anaro. El tiuj personoj, kiuj troviĝas nun en ĉi tiu ĉambrego, la grandega plimulto en la unuaj jaroj de Esperanto nenion sciis pri ĝi aŭ neklare aŭdis pri ĝi nur kiel pri ia freneza, mokinda kuriozajo; tre multaj el vi en la momento de la apero da Esperanto estis ankoraŭ infanoj; multaj, kaj certe ne la malpiej fervoraj el vi, en tiu tempo eĉ tute ne ekzistis ankoraŭ en la mondo. La grandega plimulto el vi aliĝis al nia afero nur tiam, kiam ĝi estis jam sufiĉe forta kaj elprovita. Tre kaj tre malgranda, facile kalkulebla per la fingroj, estas la nombro de tiuj personoj, kiuj iris kun Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Kortuŝite ili povas nun rememori, kiel terure malfacila estis ĉiu paŝo en la komenco, kiam ĉiu aludo pri Esperanto postulis specialan kuraĝon, kiam el ĉiu milo da semoj, kiujn ni en plej primitiva maniero, sen helpo kaj sen rimedoj pacience jetadis en la teron, apenaŭ unu ricevis radikojn.

Dudek kvin jaroj! grandegan gravecon havas tia peco da tempo en la historio de lingvo artefarita. Lingvoj naturaj kreskas tute trankvile, ĉar kun tia lingvo neniu kuraĝas fari iajn eksperimentojn aŭ fleksi ĝin laŭ sia gusto; sed pri lingvo artefarita ĉiu opinias, ke li havas rajton de voĉo, ke li povas aŭ eĉ devas direkti la sorton de la lingvo laŭ sia kompreno. En lingvo natura ĉiu eĉ plej granda efektiva malbonajo neniu incitas, eĉ neniu meditas,

kaj estas akceptata kun plena kontenteco aŭ rezignacio; en lingvo artefarita ĉio ŝajnas al ni kritikinda, ĉiu bagatelo, kiu ne estas konforma al nia gusto, pikas al ni la okulojn kaj veĥas deziron de refarado. Lingvo artefarita dum longa tempo estas elmetata al senĉe-aj ventoj, al senĉesa tirado kaj puŝado. Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado nia lingvo devis suferi dum sia dudekkvinjara vivo! Se ĝi tamen ĉion sane eltenis, se malgraŭ ĉiuj ventoj kaj puŝoj ĝi dum dudek kvin jaroj vivis kaj kreskis regule kaj rekte, ĉiam pli fortiĝante kaj riĉiĝante, neniam fleksiĝante aŭ kripliĝante, neniam minacante disfali en dialektojn, sed ĉiam pli kaj pli fortikiĝante sian tute difinitan, ĉie egalan spiriton, neniam perdante hodiaŭ, kion ĝi akiris hieraŭ, — ni povas pri tio sincere nin gratuli.

Antaŭ dudek kvin jaroj mi timeme demandis min, ĉu post dudek kvin jaroj iu en la mondo scios ankoraŭ, ke ekzistis iam Esperanto, kaj — se Esperanto vivos — ĉu oni tiam povos ankoraŭ kompreni ion, kio estis skribita en Esperanto en ĝia unua jaro, kaj ĉu angla esperantisto povos kompreni esperanton hispanan. Nun pri ĉi tio la historio donis jam plenan kaj perfekte trankviligan respondon. Ĉiu el vi scias, ke verko, skribita en bona Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj, en plena mezuro konservas sian bonecon ankaŭ nun, kaj la legantoj eĉ ne povas diri, ke ĝi estas skribita en la unua jaro de ekzistado de nia lingvo; ĉiu el vi scias, ke inter la stilo de bona angla esperantisto kaj la stilo de bona hispana esperantisto en la nuna tempo ekzistas absoluta nenia diferenco. Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank' al la *reguleco* de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas multe pli riĉa kaj pli elasta, ol la lingvo de infano kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano neniom diferencas je la lingvo de homo matura, tiel verko, skribita en Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj ne estas tiel vortoriĉa, kiel verko, skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis absolute nenion el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo. Lingvo, kiu eltenis la provon dum dudek kvin jaroj, kiu en plej bona kaj ĉiam pli floranta stato travivis jam tutan homan ge-

neracion [kaj estas jam pli maljuna, ol multaj el ĝiaj uzantoj], kiu kreis jam grandan, potence kreskantan literaturon, kiu havas sian historion kaj siajn tradiciojn, sian tute precizan spiriton kaj siajn tute klarajn idealojn, — tia lingvo ne bezonas jam timi ke io pereĝe de puŝos ĝin de tiu natura kaj rekta vojo, laŭ kiu ĝi evoluas.

La vivo kaj la tempo garantiis al nia lingvo naturan forton, kiun neniu el ni povas senpune malrespekti. La hodiaŭa jubileo estas festo de tiu vivo kaj tempo.

* * *

Por ke ni, vivantoj, povu festi la hodiaŭan jubileon, fervore kaj sindone laboris multaj personoj, kiuj nun jam ne vivas. Nia morala devo estus rememori ilin en la nuna solena momento. Sed ho ve! ilia nombro estas tro granda, por ke ni povu ilin ĉiujn citi, kaj krom tio la pli granda parto el ili laboris tiel modeste, ke ni eĉ ne scias iliajn nomojn. Tial, por ne fari maljustan apartigon inter eminentuloj kaj ne-eminentuloj, mi citos nenion nomon. Mi devas fari escepton nur por nia kamarado Van-der-Biest, kies nomo estas ankoraŭ tro freŝa en la memoro ĉe ni ĉiuj, kiu en la pasinta jaro uranĝis kaj prezidis nian grandan ĉiujaran feston kaj kies morto estas sendube ligita kun tiuj grandaj laboroj kaj malagrablaĵoj, kiujn li prenis sur sin por ni ĉiuj. En via nomo mi esprimas funebran saluton al la ombroj de ĉiuj niaj karaj kamaradoj, kiujn dum la pasintaj dudek kvin jaroj forŝiris de ni la morto. Iliaj ombroj staru nun antaŭ niaj okuloj, kvazaŭ partoprenante en tiu granda festo, kiun ili preparis, sed ne ĝisvivis. Mi proponas al vi, ke ni honoru ilian memoron per levigo de niaj seĝoj.

* * *

Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam tute eksterduba, mi turnas min al vi, karaj samideanoj, kun peto, kiun mi jam antaŭ longe volis direkti al vi, sed kiun mi ĝis nun prokrastis, ĉar mi timis fari ĝin tro frue. Mi petas, ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi, pro kaŭzoj naturaj, okupis en nia afero dum dudek kvin jaroj. Mi petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi „majstron“, ke vi ĉesu honori min per tiu titolo.

Vi scias, ke tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke mi ne volas esti mastro de Esperanto, sed ke la tutan mastrecon pri Esperanto mi en tuta pleneeco transdonis al la esperantistoj mem. Vi scias ankaŭ, ke

de tiu tempo mi ĉiam lojale agadis aŭ almenaŭ penis agadi konforme al tiu deklaro. Mi donadis al vi konsilojn, kiel mi povis, sed neniam vi aŭdis de mi la vortojn: „tion mi postulas“ aŭ „tion mi deziras“. Neniam mi provis altrudi al vi mian volon. Tamen, konsciante, ke ĝis sia plena fortikiĝo nia afero bezonas ian enkorpigitan standardon, mi — laŭ via deziro — dum dudek kvin jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi ĉefon kaj majstron. Kun ĝojo kaj fierenco mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon. Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min *antaŭ* vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur *inter* vi.

Jen estas la kaŭzo, kiu devigis min fari la nunan decidon:

La ekzistado de ia natura konstanta ĉefo, eĉ se tiu ĉefo havas nur la karakteron de unuiganta standardo, prezentas gravan maloportunaĵon por nia afero, ĉar ĝi donas al la afero kvazaŭ personan karakteron. Se al iu ne plaĉas mia persono, aŭ miaj politike-religiaj principoj, li fariĝas malamiko de Esperanto. Ĉio, kion mi persone diras aŭ faras, oni ligas kun Esperanto. La tro honora titolo de majstro, kiun vi donas al mi, kvankam ĝi en efektiveco concernas nur la aferon de la lingvo, fortenas de Esperanto multajn personojn, al kiuj mi pro ia kaŭzo ne estas simpatia kaj kiuj timas, ke, fariĝante esperantistoj ili devus rigardi min kiel sian moralan ĉefon. Ĉiu, kies opinio pri aferoj esperantistaj estas alia ol mia, ofte sin ĝenas, eldiri libere sian opinion, por ne kontraŭbatali publike tiun, kiun la esperantistoj nomas sia majstro. Se ies opinio la esperantistoj ne volas akcepti, li vidas en tio nur la ĉiopovan influon de la majstro. Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera, ne sole libera de ĉiuj personaj *dekretoj*, kia ĝi fariĝis jam antaŭ dudek kvin jaroj, sed ankaŭ de ĉia efektiva aŭ ŝajna persona *influo*. Estas necese, ke la mondo sciigu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan *majstron*. Nomu min per mia nomo, nomu min fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu „majstro“, ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi mal-liberigas nian aferon.

Multaj el vi portas en sia koro la samajn idealojn, kiel mi, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo; sed la mondo devas scii, ke tiu spirita parenceco inter mi kaj vi estas laŭvola, ke la esperantismo ne povas esti responda pri miaj personaj ideoj kaj aspiroj, kiuj por neniu el vi estas devigaj. Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ konvinkoj de tiu aŭ alia el vi, mi deziras, ke tio neniu el vi ĝenu kaj ĉiu el vi havu la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezajo de Zamenhof, kaj ĝi havas nenion komunan kun la Esperanta movado, en kiu li estas nun persono tute privata. La interna ideo de Esperanto estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkitimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton. Ĉio, kio estas super tiu interna ideo de Esperanto, estas nur *privataĵo*, kiu povas eble esti *bazita* sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata kiel *identa* kun ĝi.

* * *

Antaŭ ol ni formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de vĵaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: „kiu pli laŭte krias, tiu estas prava“. Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava *socia problemo*, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante *propagandi* nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu *estim* kaj *konfidon* por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamom kaj malpacon, kiu nur ĝoigas kaj triumfigas niajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skriblitaj la vortoj „espero, obstino kaj pacienco“; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin

estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duangravan periodon de la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: „konkordo“.

* * *

Mi finis tion, kion mi intencis diri al vi, karaj amikoj. Mi scias tre bone, ke multajn el vi mia nuna parolo malagrable senluziigos. Kun maldolĉa sento de neplenumita espero vi eble demandos: ĉu en sia lasta kongresa parolo, en sia „kanto de cigno“, li nenion pli havis por diri al ni? ĉu en la grava tago de la jubileo de la esperantismo, de tiu jubileo, kiun ni atingis post tiom multe da laboroj kaj suferoj, li nenion pli havis por diri al ni? ĉu en la unua kaj eble ankaŭ la lasta fojo, en kiu ni el ĉiuj partoj de la mondo alproksimiĝis, kiom ni povis, al tiu loko, kie Esperanto naskiĝis kaj kie la atmosfero, saturita de intergenta malpaco per neevitebla natura reago naskis la esperantisman movadon, — ĉu en ĉi tiu grava kaj solena momento li nenion pli havis por diri al ni? Ho ne, miaj karaj amikoj, miaj karaj samideanoj kaj kunlaborantoj! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi, ĉar mia koro estas plena; en la jubilea momento de la esperantismo mi volus paroli al vi pri tio, kio naskis la esperantismon, pri ĝia esenco kaj espereblaj sekvoj; sed hodiaŭ mi staras antaŭ vi ankoraŭ en rolo oficiala, kaj mi ne deziras, ke mia privata kredo estu rigardata kiel deviga kredo de ĉiuj esperantistoj. Tial pardonu min, ke mi pli ne parolas.

Kio estas la esenco de la esperantisma ideo kaj al kia estonteco alkondukos iam la homaron la interkompreniĝado sur neŭtrale-homa, sengenta lingva fundamento, — tion ni ĉiuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado. Ni donu do hodiaŭ plenan regadon al tiu silenta, sed solena kaj profunda sento, ni ne profanu ĝin per teoriaj klarigoj.

* * *

Samideanoj! La antikva pola ĉefurbo, en kiu ni kunvenis, pretigis por ni gastaman akcepton, faris multe, por honori nian aferon kaj por agrabligi al ni nian restadon dum la

kongreso. Mi esperas, ke, revenante en sian hejmon, ĉiu el vi kunportos kun si plej bonan rememoron pri tiu lando kaj urbo, kiujn la plimulto el vi ĝis nun verŝajne tre malmulte konis. Al la regno kaj lando, kiuj montris al ni sian amikecon, sed precipe al la estraro de la gastama Krakovo kaj al ĉiuj institucioj kaj personoj, kiuj donis al nia kongreso sian moralan

kaj materialan subtenon, mi esprimas en via nomo la plej koran dankon. Plej koran kamaradan dankon ni esprimas kompreneble antaŭ ĉio al la senlaca loka organiza komitato, kiu ne ŝparis laboron por la plej bona aranĝo de nia kongreso. Kaj nun mi deziras al vi ĉiuj gajan feston kaj sukcesan laboron.

N D T O. La teksto de la parolo estas nur supozata; eventualajn, lastmomentajn ŝanĝojn ni faros en nia venonta numero.

La Grupo de la geaktoroj ludantaj en „Mazepa”.




I-a vico: S-o Węgrzyn (Vengjin) — *Ĥmara*;
S-no Wysocka (Visocka) — *Amelja*;
S-o Jednowski (Jednovŝki) — *La Reĝo*;

II-a vico: S-o Stanisławski (Stanislavski) — *Mazepa*;
S-o Sosnowski (Sosnovski) — *Vojevodo*;
S-o Knake Marjański (legu same) — *Zbigniew*;

II-a vico S-o Węgrzyn-Krupińska (Vengjin-Krupinska) — *Kaŝtelanino*.

JULJUSZ SŁOWACKI.



Mia testamento.

*Mi vivis kun vi, ploris, kun vi mi sopiras;
Noblajn homojn mi amis konstante kaj ĉie,
Hodiaŭ kun spiritoj mi antaŭen iras
Malgaja, kvazaŭ estus feliĉo ĉi tie.*

*Nenian heredanton mi ĉi-tie lasis
Nek por la nomo mia, nek por kordoj miaj,
Ĉar simile al fulmo nom' mia forpasis
Kaj daŭros kiel sono, dum generacioj.*

*En legendoj prikantu vi, kiuj min vidis,
Ke pro patruj' ne unu mi suferis vundon
Kaj, dum ŝipo batalis—mi sur masto sidis,
Kiam dronis—mi iris kun ŝipo sur fundon.*

*Iam ĉiu konfesos, en penso medita
Pri sorto de patrujo mia malfeliĉa,
Ke briĵ' de mia kor' ne estis elpetita,
Sed per gloro de miaj antaŭuloj riĉa*

*Nokte miaj amikoj kunvenu en rondo,
En aloo bruligu mian lacan koron,
Kaj kor-cindron forportu al l'patrin'-en mondo
Ont tiel repagas patrinan doloron!*

*Kiam miaj amikoj ĉe pokaloj festos
Por forgesi doloron kaj propran lamenton—
—Mi montriĝos al ili, se fantom' mi estos,
Mi ne venos—se Di' ne ĉesigos turmenton.*

*Mi petegas vivantajn ne perdi esperon
Kal alle porti helan torĉo de klerigo!
Laiŭvice, eĉ de propra viv' fari oferon,
Se ilin sankta devo vokos, ne instigo!*

*Kaj mi lasas ĉi-tie amikaron mian
Malgrandan, kiun povis kor' fiera ravi.
Mi plenumis malmolan, gravan servon dian
Kaj tombon neplorotan mi konsentis havi.*

*Kiu, kiu alia sen aplaŭd' de l' mondo
Tiel indiferenta iros kaj fiera?
Kiu gvidos spiritojn sur la viva ondo
Kaj trankvile forflugos, kiel song' etera?*

*Kaj tamen post mi restos la fatala forto,
Kiu dum viv' nur frunton mian ornamigos,
Sed ĉiam nevidebla premos vin post morto,
Ĝis kiam, panmanĝuloj, ĝi vin—angeligos.*

HENRYK SIENKIEWICZ.

Pola parolo.

Parolado dirita en 1859 j. dum inauguracio de monumento al pola poeto Juljusz Słowacki (altroro de „Mazepa“) en Miloslav (pozena princo-lando.)

„La providenco, kreante popolojn, malavare ĉirkaŭŝutis niajn prapatrojn per diversaj donacoj. Ĝi donis al ili vastajn kaj fruktodonajn kamparojn; donis al ili leonajn kaj samtempe kolombajn korojn, noblajn animojn kaj viglajn mensojn, kapablajn por plej altaj pensoflugoj.

Sed tio ne estis fino de la donacoj. Oni povus pensi, ke Dio, kreante Polojn, diris al ili: „Jen krom ĉio mi donas al Vi bronzon belsonan kaj daŭran tian, el kia la popoloj, vivintaj antaŭ Vi faris statuojn por siaj herooj: mi donas al Vi la oron brilplenan kaj flekseblan kaj Vi el tiu ajo faru Vian parolon.

Kaj fariĝis tiu parolo daŭra kiel bronzo, bela kaj kara kiel oro, unu el la plej grandiozaj en la mondo, tiel majesta, belega kaj belsona, ke eble nur la lingvo de antikvaj grekoj povas esti kun ĝi komparata.

Aperis en daŭro de jarcentoj multaj majstroj de vorto, kiuj el la bronzo faris kadron de harpo, kaj surtiris sur ĝin kordojn el oro. Kaj tiam komencis kanti tiu-ĉi pola harpo kaj kant-rakonti pasintan vivadon. Ifoje ĝi muĝis kiel tondro en montoj; ifoje ĝi flugis super ebenaj, ifoje en aliaj tonoj sonis super kampoj — benanta kaj benata, pura, kiel larmo, — Dia, kiel preĝo, — dolĉa kiel amo.

Sed fine venis al tiu-ĉi harpo plej granda el majstroj, Mickieviĉ, kaj metinte sur ĝin inspiritajn manojn eligis el ĝiaj kordoj tiajn sonojn, kiujn oni eĉ ne konjektis antaŭ li. Lia kanto finiĝadis ie sur ĉiela sojlo, tiel perfekta,

tiel preskaŭ supertera, ke eĉ tiam, kiam li interrompis ludon...

Ĉiu pensis tiam, ke ankoraŭ ludas majstro, sed nur eĥo ludis... La eĥo de polaj koroj... Kaj li kantludis bruon de niaj arbaroj, plaŭdon de niaj riveroj kaj pluvoj, tondrojn de niaj tempestoj, kantojn de nia popolo ĉion, kion nia penso povas ĉirkaŭpreni, koro-senti, kaj animo imagi kiel plej subliman kaj plej belan en la mondo.

Do povus ŝajni, ke post li kaj apud li jam neniu povas aldoni ion al ĉi-tiu parolo, ke ĝi atingis jam zeniton, ke neniu povas ĝin pli perfektigi aŭ ornami.

Kaj tamen sin trovis la poeto, kiu faris tion. (Slovacki)

Jes! Li faris tion. Li prenis plenmane perlojn, safirojn, purpuron, ĉielarkajn brilojn, brilplajn diamantojn kaj per ili li surŝutis la harpon nian tiel malavare, tiel senmezure, ke ĝi ekstaris antaŭ li kaj antaŭ ni en neimagebla brilo, beleco kaj majesto, kvazaŭ Harpo-Reĝino, antaŭ kiu fleksigas genuoj de l' popolo kaj klinas sin fruntoj kiel iam, antaŭ la harpo de Davido. Kaj jen estas lia merito, lia gloro, lia grandeco.

La gentoj ĉerpos el tiuj ĉi trezoroj, la gentoj, kun admiro kaj miro demandas kiel li povis tion fari? Kaj tamen li faris. Li sciis — ĉar poezio en lia animo estis kiel senmezuraj akvoj de maroj, li sciis ĉar nur al mortintoj oni povas nenion aldoni. Antaŭ la viva reĝino ĉiam oni povas klini fruntan kaj alporti trezorojn por ofero; tiu reĝino, al kiu li ĉion oferis, estis kaj estos ne nur viva sed anklaŭ senmorta.

trad. Zofja Czerwińska.

WŁADYSŁAW ORKAN.

Sur la kampo.

Vilaĝano sur kamparon ekeliris kun falĉil'... mortsimila! La skeleto, ŝancelanta meze de la grenspikar'... Li ekstaris, ekrigardis... lia kap' kliniĝis: „Kia estos jar', nuna jar', ĉu rikoltos eĉ kvaronon ni el semoj mil?!.. — Ne rikoltos ni eĉ tion — tro malgranda spik' — tro mizera grain'...“

Li falĉilon jetis teren, ekaŭdiĝis son'... rikoltilon jetis for: „Donis Di' al vi la vivon... por dolor'!“ Dentojn li kunpremis — sur palpe-

broj, jen, aperis larm!.. Malproksimen ekrigardis li tra larmoj for. — „Jes, nun mi pereis devos... Nu, nenio... verel kio? Mi? nenio! — sed infanoj... pro infanoj — la bedaŭro, pro infanoj — kordolor'!“ kaj al koro superforte alpremiĝas stranga la timen'. — kaj tra l' kampoj ripozantaj, tra la grizaj plugaj kampoj kaj tra griza gren' jen forflugis neaŭdebla kaj mallaŭta ĝem'...

El pola lingvo tradukis J. Litauer.

Polaj popolkantoj.

(Kvarvoĉe aranĝitaj de Gall.)

I. Macjek.

*Kun batil' ĉe zono iras Macjek voje,
latempe kantas „tim-di-rim-di“ ĝoje,
Se iu baras straton,
Ricevas kapobaton,
Oj da, dana!
Ho vel' malsaniĝis Macjek nia kara,
En drinkej' ne estis dum vespero kvara;
Jam al ni ne kantetos,
Bieron ne aĉetos.*

Oj da, dana!

*Mortis Macjek, mortis, venis lia horo,
Pacon la eternan donu Di-sinjoro!
Li estis brava viro
Ĝis lasta sia spiro.*

Oj da, dana!

*Nia Macjek kuŝas sur kverka tabulo,
Se muziko ludus, saltus li—mortulo;
Ĉar Mazuro, anim' forta,
Moviĝas, kvankam morta.
Oj da, dana!*

2. El hejm' fordonis min patrineto.

*El hejm' fordonis min patrineto
Al fremdaj homoj, en fremda land'!
Kaj ŝi proponis, kaj ŝi ordonis,
Sep jarojn resti for,
Sep jarojn resti for!*

3. Donu min al Jasjo...

*Donu min al Jasjo, mia patrineto!
Plaĉas al mi ringoj ĉe lia zoneto.
Oj dana!
Plaĉas al mi ringoj, koloro liphara,
Do min edzinigu, patrineto kara!
Oj dana!
Diru al mi, diru, kion diri volas,
Ĉar mi ĝin ne scias, se vi ne parolas.
Oj dana!
Edziĝu, edziĝu, vi bonfartos, frato,
Havos vi amadon, plendos pri malsato
Oj dana!*

4. La viburno.

*Ho viburneto, ĉe l' torento,
Ĉu vin timigas seka vento?*

*Se mi ne timus pri sek-vento,
Mi ja ne starus ĉe l' torento.
Sur la monteto mi starigus,
Kaj al acero egaligus.
Vi disvolviĝu, viburneto!
Kaj vi pripensu, knabineto.
Jam pripensado mia pasis,
Patron, patrinon mi forlasis.*

5. Fajr-ellgu, hufumetoj.


*Fajreligu, hufumetoj!
Indas tion knabinetoj.
Se ne indas ĉe knabino,
Kalkanfrapu ni sen fino,
Ĝis, ĝis, ĝis, ĝis maten'!
Frapu vigle per botejoj!
Ŝtalaj estas hufumetoj,
Ke eliĝu fajreretoj.
Frapu vigle per botejoj
Ĝis, ĝis, ĝis, ĝis maten'!*

6. Ebenigu vi, montojn, valojn, Di'!

*Ebenigu vi, montojn, valojn, Di'!
Ke estu luf-ebene.
Gvidu, ho Sinjor', lin al mia kor',
Dimanĉe, frumatene!
Malgraŭ la dimanĉ' lacigu, fianĉ',
Vian ĉevaleton voje,
Estas mia kor' plena de dolor',
Kaj plendas ĝi malĝoje.*

7. La kozako.

*Sur monteto tie staras verda la acero,
Mortas juna la kozako sur la fremda tero.
„Mortas mi, en fremda lando venas vivo fino,
Do sciigu la patrinon, mia amatinol“
Kaj alvenis la patrino, venis patrineto,
Turnis palan la vizaĝon kontraŭ la fileto:
„Ho fileto mia kara, devis vi perci,
Ĉar ne volis vi konsilojn de l' patrin' obei.“
„Mi vin petas, patrineto, be!e enterigu,
Oni batu sonorilojn, orgenon ludigu,
Sed ne gvidu min al tombo pastroj nek dia-
[kof,
Nur en teron ukrainaj metu min kozakoj.
Esperantigis Antoni Grabowski.*



JAN KOCHANOWSKI.*)

Dia protekto.**)

*Kiu sin donos al sia Sinjoro
Kaj al Li fidas profunde en koro,
Sentime diros: Dio min defendas,
Do min nenia teruro atendas.*

*Li vin de ĉasa danĝero detenos
Kaj dum la pesto en gardon vin prenos,
En ombr' de siajflugiloj vin kaŝos,
Sub liaj plumoj sentime vi paŝos,*

*Lia protekto estas ŝildo forta,
Malantaŭ kiu nenia tim' morta
Vin ĉirkaŭprenos, ne zorgu je saĝoj,
Kiujn dissemas la sorto dum tagoj.*

*Tial mortfalos ĉirkaŭ vi mil kapoj
Kaj dua mil; sed vin ne tuŝos frapoj
De glav' dutranĉa—vi per la okuloj
Propraj ekvidos venĝon je pekuloj.*

*Voĉ' lia de mi estos aŭskultita,
Li estos ĉiam de mi defendita,
Li estu certa pri mia memoro
kaj viv' multjara kaj mia favoro.*

El pola lingvo tradukis Br. Kuhl.

*Ĉar vi konfesis: Di' espero mia,
Ĉar Di' plej supra estas gardo via —
Do vin atingos nek malbona homo,
Nek vi renkontos domaĝon en domo.*

*Li ordonados al la ĉielanoj
Gardi vin ĉiam; ili vin sur manoj
Estos tenantaj, por ke vi survoje
Sur akra ŝtono ne vundu vin foje.*

*Vi sendanĝere kolerajn vipurojn
Kaj la serpentojn surpaŝos terurajn,
Vi rajdos sur la minaca leono
Kaj grandan drakon havos je dispono.*

*Aŭdu je Dia vort': se min surtere
Iu amadas kaj agas sincere,
Do mi lin ankaŭ ja ne malmemoros
En la danĝero, sed ĉiam favoros.*

*) La plej eminenta pola poeto de la XVI jarcento.

***) Kantota dum la protestanta Diservo en Kraków dum la Oka Kongreso Esperantista.

Silento vespera.

Al S-ro D-ro MIECZYSLAW ŚMOLARSKI.

*Malaperis jam suno la ora...
En nigreta jen dronas purpur'
La ĝardeno multarba, mullflora...
Ĉi endormas... aŭdiĝas la ĥora,
Nokta preĝo de l' tuta natur'...*

*Lunradioj glit-iras serpente
Tra la arboj, floraro, kaj jen
En fontano rebrilas argente...
En la lumo mistera silente
Endormita jam kuŝas ĝarden'.*

*Surda regas silent' en aero
Nur je perloj gutiĝas fontan',
Nur la floroj murmuris sur tero,
Nur en brusto la koro-mistero
Ion flustras... Nur tremas la man'...*

verkis Juliusz Krłsa.

KLEVE.

La leciono de danco.

— Kara mia — diras al mi antaŭhieraŭ mia edzino — nenio helpos, vi devas iri al danc-instruisto por kelkaj lecionoj, ĉar en tiu-ĉi karnavalo ni devas partopreni kelkajn danc-vesperojn, sed sen scio de danco estas sencece ĉeesti danc-vesperojn.

Mi defendis min laŭpove, mi perŝadis al la edzino, ke estus ridinda en mia aĝo komenci lernadon de danco, sed helpis nenio.

La duan tagon vespere mi jam estis en danc-lernejo. Ni interkonsentis kun la profesoro ke por difinita, antaŭe pagita sumo, li en dek lecionoj tiel perfektigos miajn piedojn, ke ili estos kapablaj por ĉiu danco.

Kaj tuj ni komencis unuan lecionon de „paŝoj“. La paŝoj, aŭ pli ĝuste la leciono de paŝoj estas turmendado pri kiu mi povus verki dikkan volumon. Komence mi tute ne konjektis mian kripoleon pri kiu atentigis mia la profesoro. Ĝis nun mi vivis erarpense, ke mi havas la piedojn — kiel oni diras — en ordo, sed nur nun mi eksciis, ke ili tute ne estas piedoj. Ili estas iaj ŝtipoj — diris la profesoro — aŭ ekreskintaj en teron telegrafaj stangoj, sed ne piedoj, je Dio sankta, ne piedoj! Kaj kvankam mi havis tute kontraŭan opinion, la profesoro ne permesis komprenigi al si kaj ne ĉesis veni ke en plej bona okazo tio estas paro de bareletoj, sed ne piedoj.

Li povis ĉion permesi al si ĉar li jam antaŭe prenis honorarion. Jes, vere, ke mi ne naskiĝis por esti baletisto kaj tial ni ambaŭ tre ŝvitis, sed ke mia profesoro estis iom nervema — tio estis tute certa. Kion faris tiu homo kun miaj piedoj — nur Dio scias. Neniam mi pardonos tion al li.

Pleje kolerigis lin mia maldekstra piedo.

Li certigis, kaj eĉ donis por tio vorto de honoro, ke, ĝuste dirante, tio estas nek maldekstra nek dekstra piedo, nur ia „fremda“. Fine mi tute forgesis, kiu estas mia dekstra piedo kaj kiu maldekstra, tiel ĉio intermiksiĝis. Li ankaŭ konstatis, ke mi eĉ ne scias iridi ĉar devante iri antaŭen, mi iras returnen kaj reciproke. Iafoje li kriis furioze:

Forgesu vi al cent diabloj, ke vi havas dekstran piedon kaj staru sur la maldekstra, ŝajnu al vi, ke la dekstran piedon vi perdis en milito aŭ, ke hundo ĝin al vi demordis, aŭ ekzekutisto ĝin forprenis kaj vendis — ah, mi jam mem ne scias kiel paroli al viaj piedoj! Tuta kaŭzo estis, ke la estimata profesoro parolis al miaj piedoj precipe france, kion komprenis nek mi, nek miaj piedoj. La francajn esprimojn mi ripetadis konstante, por bone ilin memori kaj tial mi malpli atentis kion mi devas fari per miaj piedoj.

— Kion vi ĝis nun faris per viaj piedoj?! — demandis la iritita profesoro.

— Tion, kion faras ĉiu — mi respondis hontigite.

— Ne, sinjoro — kriis la profesoro — vi eble konservis ilin en ia fluidaĵo, de kio viaj piedoj rigidigis kiel kverkoj. Vi ne havas en viaj piedoj inteligentecon eĉ por unu groŝo!

Mi repetas nur la plej delikatajn ofendvortojn, pri gravaj mi eĉ ne aludas, ĉar tio iritas min. Li eĉ kuraĝis diri, ke per tiaj piedoj oni povus mortigi duonon da regimento de soldatoj.

Tiu unua leciono estis la lasta, kaj mi ĝis nun dufoje ĉiutage masaĝas miajn piedojn kaj mi ne povas reveni al norma stato.

Trad. Ĉ.

Ĉirkaŭ la Kongreso.

Agrabla surprizo por partoprenantoj de la Oka.

La firmo *Jaroslav Lanka en KAMENICE nad Lipou, Bohemujo-Aŭstrio* fabrikis por la Oka grandan serlon da belaj, diversspecaj vitraj objektoj kun pentritaj vidajoj de Krakovo, kun ĉarmaj ornamajoj, esperantaj proverboj kaj devizoj, kiuj surhavige la vortojn: „Rememoro je VIII Universala kongreso esperantista en Krakovo“ kaj s., estas vere valoraj kaj taŭgaj rememoroobjektoj per la vizitontoj mem, kaj samtempe bela donaco por konatuloj. La vizitonto de esperanta vendejo estos certe surprizita per la ekspozicio de nomita firmo vidante tie en plej bela harmonio delikatajn florvazojn, plej diversan trinki-

laron, paperpremiolojn, vojaĝboteletojn, poŝglaŝojn, kafovazojn, salujojn kaj m. a. La firmo enkondukante tiamaniere novan esperantan industrispecon venas al interesuloj renkonten per tio, ke ĝi malgraŭ multaj elspezoj, kaŭzitaĵe ĉe nova entrepreno, fiksas por tiuj ĉi esperantanoj tute moderajn prezojn. Ĉerte neniu samideano, kiu vizitos kongresan ekspozicion, preteriros senatente la nomitajn objektojn, sen trarigardo kaj aĉeto de belaj, plaĉindaj vitraj — valoraj rememoroobjektoj de la Oka.

Estas dezirinde, ke la kongresanoj subtenu per sia favoro la entreprenon!

Plano de Krakovo.



Klarigoj al la plano.

- | | |
|---|--|
| 1. Preĝejo de S-ta Mario. | 31. Societo de Art-protektantoj. |
| 2. " " S-ta Barbaro. | 32. Monum. de Arturo Grottger. |
| 3. " " S-ta Adalberto. | 33. Agrikultura Societo. |
| 4. " " P. P. Franciskanoj. | 34. Malnova teatro. |
| 5. " " P. P. Dominikanoj. | 35. Jagiellona Biblioteko. |
| 6. " " S-ta Petro. | 36. Monum. de Kopernik. |
| 7. " " S-ta Andreo. | 37. Universitato. |
| 8. " " Protestanta. | 38. Komerca Akademio. |
| 9. " " S-ta Idzi. | 39. Societo „Falko“. |
| 10. " " P. P. Bernardanoj. | 40. Turo de iama urbodomo. |
| 11. " " S-ta Nikolao. | 41. Malnova sinagogo. |
| 12. " " S-ta Lazaro. | 42. Malnova Urbodomo. |
| 13. " " S-ta Kruco. | 43. Monum. de Al. Fredro. |
| 14. " " S-ta Tomaso. | 44. Monum. de Straszewski. |
| 15. " " S-ta Johano. | 45. Muzeo de Czapski. |
| 16. " " P. P. Piaristoj. | 46. „ „ teĥn.-industria. |
| 17. " " S-ta Marko. | 47. Fajrobrigadejo. |
| 18. " " P. P. Reformatoroj. | 48. Direktejo de Polico. |
| 19. " " S-ta Anno. | 49. Juĝejo. |
| 20. " " Grek-Katolika. | 50. Inĝeniera estraro. |
| 21. " " P. p. Kapucenoj. | 51. Urba Ŝpar-kaso. |
| 22. " " Mizerikordo. | 52. Urba arestejo. |
| 23. Monaĥejo de f-inoj Felicianinoj. | 53. Barbakano. |
| 24. Akademio de Sciencoj. | 54. Pordego de S-ta Floriano. |
| 25. " „ Bel-arto. | 55. Bibl. de Soc. de popola Lernejo. |
| 26. Direktejo de Fervojoj. | 56. Urba labor-kontoro. |
| 27. Monum. de reĝo Jagiello. | 57. Teĥnikista Societo. |
| 28. Komerca Ĉambro. | 58. Monum. de Mickiewicz. |
| 29. Monum. de gereĝoj: Wlad. Jagiello kaj
Jadvigo. | 59. Agrikultura fakto de Universitato. |
| 30. Somera teatro en la parko. | 60. Monum. de Rejtan. |

Salminejoj en Wieliczka.

Tre interesa estas la legendo de l' deveno de la salminejoj en Wieliczka. Ĝi estas konata preskaŭ al ĉiuj Poloj sciantaj legi. La malgranda infano jam sciigas el la libretoj kun belaj legendoj, ke tiu, kiu donacis nin per la ŝatinda, sala trezoro estas sankta Kingo, filino de la hungara reĝo, kaj edzino de nia pola reĝo, Boleslavo Hontema. Oni sciigas, ke saĝa, sankta junulino elpetis ĉe sia patro nenian alian doton nur tian, kiu estus al la Polanoj la plej utila, nome ŝi elpetis la riĉegan salminejon. Envere mirinda estas la maniero per kiu poste la sanktulino transportis sian doton. Sed sanktulino... ŝi ĉion povis. Ŝi iris al la salminejo, demetis sian fianĉigan ringon kaj enjetis ĝin en la profundegan kavon, el kiu oni la salon eligadis. Tion farinte ŝi tute kviete, senzorge forlasis sian patrujon kaj baldaŭ ŝi en la Pollandon venis. Sed ŝia fianĉiga ringo? Eble la juna edzo miris, ke ŝi ĝin ne plu havas... Jes: kaj ŝi alkondukis sian edzon al la urbeto Wieliczka kaj

tie, meze de la urbplaco ŝi ordonis fosi la profundan puton. Oni longe fosis kaj fosis kaj fine oni trafis la tiel malmolan, ŝtonan grundon, ke oni ĝin jam ne povis trafosi. Tiam ordonis Kingo dehaki pecon de tiu malmolajo kaj ĝin al ŝi doni. Oni plenumis la ordonon kaj oni kun mirego konstatis, ke la malmola, ŝtona grundo estas la salo. Poste ordonis Kingo dispecetigi la alportitan salbulon. Ĉiuj ĉecstantoj scieme atendis kio plue okazos kaj—ho miro! — el la frakasita salbulo elfalis... la reĝina, fianĉiga ringo, kiun Kingo estis jetinta en la hungaran salminejon. Kaj jen nemezureblaj salaj tavoloj fariĝis la reĝeca doto de l' sankta kaj saĝa reĝidino.

Tia estas la legendo pri la komenco de l' salminejoj en Wieliczka.

Konatiĝu ni kun tiu ĉi vera trezoro de l' nia patrujo. Oni nin riproĉas:

„Frendan vi laŭdas

„Sed propran ne konas...

Jes! estas justa la supra riproĉo. Oni ad-

miras la fremdajn vidindaĵojn, oni forlasas la partruĵojn, por ke viziti la eksterlandajn miraklojn de l' naturo, eksterlandajn ĉefverkojn de l' homaj manoj, eksterlandajn produktojn de l' homa spirito — oni ĉion tion nepre volas vidi ne pripensinte tamen ofte, ke oni ankoraŭ ne vidis tion, kion ĉiu eksterlandano dezirus vidi, tion kies glora famo estas kvazaŭ dissemita tra la tuta mondo. Tio ĝuste koncernas la salminejon en Wieliczka.

Tio, kion oni kutime en la salminejoj vizitadas, estas la tiel nomataj kameroj. Ili troviĝas inter la unua kaj la tria „etaĝo“ kaj estas disjetitaj precipe en la orienta parto de la salminejoj. Kameroj tiaj estas la — jam malplenaj lokoj, el kiuj oni antaŭ la longa tempo elprenis la salon. Ili estas ofte provizitaj per la ligna ĉirkaŭtabuligo kaj ornamitaj per multaj bildoj, plataĵoj, surskriboj kaj figuroj alegoriaj. Oni ne devas aldoni, ke el tiuj-ĉi ornamadoj oni povas bone konatiĝi kun la minista tekniko ĝenerale, kaj speciale kun tiu ĉi la pola. Oni baldaŭ komprenos ke nia minekspluatado estas la vera gloro kaj fiero de l' pola nomo. Ne estas tamen tio la ĉio.

Jen ekflamas en la kameroj la multaj fajroj... Kvazaŭ en ia mirinda fabelo ekbrilas nune la malhelaj mineĵaj ŝtonegoj per miloj da koloroj... Ŝajnas, ke tio estas la regiono de sorĉoj kaj revoj. Nenia plumo povas tian belajon priskribi. Oni mem devas ĝin vidi, admiri.

Ĉiu kamero havas sian specialan ĉarmon, en ĉiu el ili oni estas alimaniere impresigita, alimaniere sorĉita. La unua impresado estas penso pri la Dio. Kaŭzas ĝin la kapelo de sankta Antonio, troviĝanta sur la unua etaĝo. En tiu ĉi kapelo estis antaŭ la jaroj solenita ĉiutage la sankta meso por la ministoj komencontaj ilian malfacilan laboron. La grandan impreson pligrandigas ankoraŭ ĉi tie la surskribo, gravurita super la ambono: „Kiam ni en tiujn ĉi mallumajn subterajn malsupreniras, ni Vin, ho Dio, pri Via helpo petagas“.

Ĉio en la supre citita kamero estas el la salo: ŝtupoj, altaro, krucifikso, kandelabroj, ambono, statuoj. Oni devas ankaŭ aldoni, ke ĉio estas tie bele kaj artece pretigita kaj ornamita.

La dua, kiu turnas sur sin la specialan atenton estas la kamero „Michalowice“. Estas tio la plej grandioza kaj la plej vasta kamero el ĉiuj. Ĝi estas 36m alta, 28m larĝa kaj 18m longa. Nekalkuleblaj lignaj pilastroj, arkitekture interligitaj kaj subtenataj la kameran

plafonon pligrandigas ankoraŭ la impreson de l' grandiozeco. Meze de la kamero pendas grandega lustro, preparita el la kristala salo. Ĉe la iluminado de l' kamero per la koloraj bengalaj flamoj kaj per la lustrkandeloj, oni sentas sin kvazaŭ etulo ia kontraŭ la naturfortegoj kaj iliaj misteroj. Impreso, kiun oni tiam eksentas estas unuvorte iom surprenanta, kaj la sento de la silenta timo kaj samtempe de la solena ĝojo estas per la mildaj sonoj de la alte staranta ministra ĥoro ankoraŭ pligrandigita.

La tria kamero havas la nomon „Kamero de imperiestro Franco“. Troviĝas tie du salaj obeliskoj kun la surskriboj: „Francisko Primo Imperatori Austriae“ kaj „Carolinae Augustae Imperatrici Austriae“. Malantaŭ tiuj ĉi obeliskoj troviĝas tre bela sala pordego kaj la longa ligna ponto, etendita sentime kaj riske super la abismo. El ĉi ponto malsupren rigardante, oni vidas sub la piedoj la kolosan obeliskon, dediĉitan al la ĉefduko Rudolfo kaj al la ĉefdukino Stefano.

La sekvanta kamero „Drozdovice“ posedas la belan lignan ĉirkaŭtabuligon, provizitan per la galerioj, kiuj ebligas la pririgardadon de la plafono kaj de la flankoj kaj samtempe donas al la kamero ian estetikan aspekton. Troviĝas ĉi tie rememoraĵo de le 500 jara jubileo de l' krakova Universitato. Estas tio nome la marmora memortabulo kun la ĝusta, latina surskribo.

Post la ĵus priskribita kamero oni vizitadas kutime la kameron de la ĉefduko Frideriko. Ĝi troviĝas sur la tria etaĝo t. e. 135m sub la tersupraĵo. Ĝia ĉirkaŭlaĵo kaj ĝi mem prezentas kvazaŭ iun regionon de l' fabelo kaj fantazio. Oni sentas sin tute sorĉita kaj emociita per la vidaĵo, kiun oni havas antaŭ la okuloj. Oni ŝajnas esti alkondukita al ia ensorĉigita groto, plena da misteraj kaj moviĝantaj ombroj kaj ombretoj, plena da fantomoj, kaŭzitaj per la arta lumigado kaj per la incitita fantazio. La muziko, kies sonoj aŭdiĝas ĉi tie, plifortigas ankoraŭ la senton de l' miro kaj ravo.

Sekvas nune la abunde lumigita stacidomo de la grafo Gohuchowski. Tiu ĉi kamero estas la ripozejo de l' lacigitaj turistoj. La riĉa bufedo plifortigas ilin kaj emigas al la plua vizitado de la salminejo.

Estas tia plifortigo kaj emigo tre bezona kaj utila, ĉar jen atendas je la turistoj la vera naturmiraklo. Estas tio kamero de la ĉefduko Rudolfo kaj ĉefdukino Stefano, en kiu troviĝas granda, subtera lago. Nekalkulebla

nombro de la lumetoj, kiuj ornamas la kurbiĝoj de la kamero rebriladas ŝancelante en la akvo... la salaj flankoj kaj malleviĝantaj el ili salgutajoj (stalaktitoj) brilas per ĉiuj ĉielarkaj koloroj... el la lago mem vidiĝas forĝita el la salo kaj per la aureolo de l' lumoj ĉirkaŭita figuro de l' sankta Johano Nepomuceno... Ĉio formas mirandan kaj ravindan tutajon. El la malproksimo aŭdiĝas la ĥoro de l' ministoj, kiu plilaŭtiĝas laŭgrade kun la alproksimiĝado de la pramo, sur kiu ĝi troviĝas. Oni estas forte kortuŝita kiam oni forlasas la kameron; en la koro regas la agordiĝo, kiun oni ne povas priskribi.

Restas ankoraŭ kapelo de la sankta Kingo kaj la kamero Łęków aŭ la bala ĉambrego. Kio koncernas tiun ĉi unuan ĝi estas unu el la ĉefaj vidindaĵoj de la minejo. Malgraŭ la laciĝo oni dezirus ĉi tie kiel eble plej longe restadi, por ke ĉion vidi, ĉion memori. Sed la tempo forkuras; oni devas adiaŭi la sanktejon, kaj jen la sala ĉambrego allogas nin nun al la rea ripozo, aŭ — se havas iu la volon kaj forton... al la dancado. La ekskluzive gaja impresio finigas la subteran impresaron...

Zofja Kronenberg.

25 lat temu.

(List Leo Belmonta do D-ra L. L. Zamenhofs.)*

Wielce Szanowny Panie.

Muszę wypowiedzieć moją myśl — nie mogę skrępować mego pióra — czuję potrzebę zaraz, w pierwszych słowach zawołać: „Pan zwyciężysz, Pan zwyciężysz!” Jakkolwiek ślepy świat będzie uśmiechał się i śmiał do rozpuku, palcami wskazywać będzie „robicielei języków, ekwilibrystów gramatyki, prawodawców gwary wszechświatowej”, jakkolwiek Volapitkiści i Esperantyści dziś niejednokrotnie zalewają się rumieńcem w praktycznym towarzystwie, kryją w kątach duszy swoje „błędne sny”, albo nawet wystawiają się na pośmiewisko; jakkolwiek zawodowi krytycy, klęczący tylko przed własnym rozumem, lub przed przeszłością, nie rozumiejący przyszłości, kiwają „mądrzeni słowami”, jakkolwiek, wreszcie, wielu ludzi zagrozi Pańską drogę przeciw Volapitkowi, mimo tysiąca innych przyczyn i przeszkód, Pan zwyciężysz, Panie, Pan zwyciężysz!

Oto dziś, z każdym dniem, coraz więcej wierzę, że po niedługim czasie Pański język zadźwięczy w milionach ust od jednego do drugiego krańca Europy. Jest on tak łatwy, że wielka część ludzi nie pojmie Pańskiego trudu; już dziś słyszałem: mówią, że nie dałeś Pan nic, żeś tylko zlekka przemienił słowa języków romańskich... a wiedz Pan — ba! Pan sam to wiesz najlepiej — to jest największą Pańską zasługą; ludzkość zrozumie to z czasem!

Ja zaś szczęśliwym się czuję, że już dziś znam język Pański. Ile radości posiadałem ztąd! Coraz bardziej dziwię się, że za pomocą Pańskiego drobnego słowniczka można wypo-

wiedzieć takie bogactwo myśli i odcieniów myśli!

Jeszcze wczoraj nie wierzyłem, że znajdę w nim to, co mam dzisiaj. I to nie będzie przesadną pochwałą, gdy rzeknę, że w Pańskim języku tworzyć można łatwymi środkami wzmocnienie i osłabienie, śmiałość i ironję, iskierki i cienie uczuć widoczniej, zrozumialej i czulej, niż w językach naturalnych; a styl jego będzie stawał się z czasem coraz oryginalniejszy, nowszy, bardziej lakoniczny i myśli pełny, błyskotliwy, harmonijny i dowcipny!

Nie mógłbym rzec tego wszystkiego Panu wprost w oczy; ale możesz mi Pan wierzyć całem sercem. Gdy to piszę, piszę z całą wiarą i nadzieją i nie mogę pisać inaczej, widząc, jak moje pióro leci, bieży, płynie po papierze, jak dobrze słucha moich myśli i nie oszukuje mnie.

I czyliłm spocił się, lub znudził, ucząc się Pańskiego języka? Nie! ani trochę!

Ach! gdyby nauczyciele mas, ludzie genialni, poeci, znali język Pański! Ja, co dziś nieco znam kilka innych języków, już mam dzięki temu horyzont o wiele szerszy..

Twórca dobrego języka międzynarodowego jest niemal drugim Gutenbergiem: ten ostatni dał skrzydła myśli ludzkiej, ale ów rozbija mury językowe, które zagroziły dostęp myślom od innych narodów!

A Pan jesteś takim twórcą! Jakkolwiek nie jestem prorokiem, ni wróżbitą, mam odwagę zawołać do Pana:

Zwyciężysz!

UWAGA.

*) Powyższy list napisany został w języku

esperanckim 25 lat temu przez 22-letniego wówczas studenta prawa Leo Belmonta — w Październiku roku 1887-go, w miesiąc po wpadnięciu książeczki d-r-a Esperanto w ręce piszącego.

Twórca języka i autor świeżo wydanej gramatyki języka międzynarodowego, na ówczas jeszcze nikomu nieznaney — odpowie-

dział jednemu z pierwszych swoich uczniów listem tegoż dnia. Dziękował z właściwą mu skromnością, uznając list Belmonta za zbyt pochwalny (tro laŭdanta).

Czas dowiódł, że przepowiednia Leo Belmonta spełniła się. Ósmy Kongres esperancki w Krakowie, jest nowym tryumfalnym etapem Esperanta w drodze do ostatecznego zwycięstwa dla dobra ludzkości.

Antaŭ 25 jaroj.

Nia malnova samideano kaj esperanta poeto S-o Leo Belmont antaŭ 25 jaroj, tuj kiam li eklernis Esperanton, ravite skribis al nia Majstro ĉi suban leteron, en kiu li profetis la venkon de Esperanto.

Estimegeta Sinjoro,

Mi devas ekdiri mian penson, mi ne povas malliberigi mian skribilon, mi bezonas nun, en plej proksimaj vortoj, ekvoĉi al vi: „Vi venkos, sinjoro, vi venkos!“ Kvankam blinda mondo ridetas kaj ridegas, per fingroj montras la „lingvofaristojn, la gramatikajn ekvilibristojn, la leĝdonantojn de tutmonda parolegajo“, kvankam Volapükanoj kaj Esperantanoj hodiaŭ ne unufoje ruĝiĝas je vangoj en praktika societo, kaŝas en anguloj de l'animo sian „sonĝeraron“ aŭ eĉ faras sin „ridindaj“; kvankam iaj kritikuloj, genuiĝantaj nur antaŭ propra saĝeco aŭ antaŭ estinto, ne komprenantaj la estonton, ŝanceligas la „saĝaj kapoj“; — kvankam, fine, multaj homoj ekbaros vian iradon kontraŭ Volapük, malgraŭ mil aliaj kaŭzoj kaj baroj, vi venkos, Sinjoro, vi venkos!

Mi nun, kun ĉiu tago, pli kredas, ke post mallonga tempo via lingvo eksonos en milaj buŝoj de l'unua fino ĝis dua fino de Eŭropo. Tiel facila ĝi estas, ke la plej granda parto de homoj ne komprenos vian laboron; jam hodiaŭ mi aŭdis: oni diris, ke vi donis nenion, ke vi nur ŝanĝetis la vortojn de lingvoj romanaj... kaj sciu, Sinjoro — ha, vi mem tion scias — ke ĝi estas la plej granda laŭdo por vi, la homaro tion poste komprenos!

Kaj mi, mi estos feliĉa, ke jam hodiaŭ mi

konas vian lingvon. Kiom da plezuro havas mi per ĝi! Mi pli kaj pli miras, ke per via vortareto oni povas eldiri tielan riĉecon da pensoj kaj pensunuancoj!

Mi ne kredis ankoraŭ hieraŭ, ke mi trovos tion kion mi havas hodiaŭ. Ĝi ne estos superlaŭdo, se mi diros, ke en via lingvo ani povas ekkrei per facilaj rimedoj fortajon kaj malfortajon (egecon kaj etecon), kuraĝecon kaj ironion, fajrejojn kaj ombrejojn de pensoj, de sentoj, pli videble, pli kompreneble, pli senteble ol en la lingvoj naturaj; stilo tie ĉi estos kun tempo pli originala, pli nova, pli lakonika kaj pensoplena, brila, harmonia kaj sprita!

Mi ne povus al vi ĉion diri antaŭ okuloj; sed vi povas kredi al mi per via tuta koro. Kion mi skribas, mi skribas kun kredo kaj espero, kaj mi ne povas alie skribi, kiam mi vidas, ke mia plumo flugas, kuras kaj fluas sur papero kaj ankaŭ bone aŭdas miajn pensojn kaj ne trompas min!

Kaj ĉu mi tre ŝvitis aŭ tre enuis, eklernante vian lingvon?... Nel... neniom!...

Ho! se la instruistoj de l'amaso, la genlaj homoj, la poetoj konus vian lingvon!! Mi, kiu hodiaŭ iom konas kelkajn aliajn lingvojn, mi jam havas multe pli larĝan horizonton!

La kreinto de bona lingvo internacia estas preskaŭ dua Gutenbergo: tiu ĉi donis flugilojn al homa penso, tiu detruas la lingvajn murojn, kluj baradis la pensojn de la diversaj popoloj!

Kaj vi estas tia kreinto! Kvankam mi estas nek antaŭvidanto, nek estontparolisto, (profeto) mi maltimas tion ekvoĉi:

Vi venkos, Sinjoro, vi venkos!



Krakovo antaŭ cent jaroj.

Unua gazeto semajna en Krakovo „Pola Merkurio“ aperadis en 1661 j. nur 5 monatoj. Poste translokitigita Varsoviaj daŭrigis tie sian aperadon ĝis 1694 j. Intertempe aperis en Krakovo „Krakova Merkurio“ (1697 — 1698). Post 1698 ĝis 1760 eliris nek unu gazeto. Post franca revolucio kaj pli vigla politika kaj socia vivo aperadis multe da gazetoj, kiuj montras al ni la tiaman pensmanieron de Krakova loĝantaro.

Malgranda urbo detruita ankoraŭ per la svedaj invadoj, estis preskaŭ fortranĉita de antaŭurboj. Fortikajojn el ruĝa briko kun bastionoj ĉirkaŭantaj la muron oni komencis detru, la apudajn fosojn plenigi per la tero 2 X. 1803. Tiel ordonis aŭstria registaro. Poste kiam Krakovo troviĝis sub saksa reĝo Frederiko Aŭgusto oni detruis jam la duondetruitajn murojn, ĉar ili iritis la okulojn de la loĝantaro per siaj ruinaĵoj kaj oni vendis 11 IV 1810 materialon el la detruo. La urbo lernis uzi unufoje la ŝtonkarbon, per kiuj multe da mallertaj personoj morte sin haladzis en februaro de 1802 j., kaj ankaŭ unufoje oni komencis sin vakcini (1 VI 1802.) La vivo meze monotona estis interrompita per la alveno de diversaj politikite eminentaj homoj. Krakovo havis sian teatron en kiu oni ludis polajn verkojn. Oni festis la naskiĝotagon de la aŭstria reĝo kaj aliajn gravajn okazintaĵojn, sed sur tiu ekstera vizaĝo, ekzistis interna malkontento. Senmaske oni tion montris post la okupo de Krakovo de polaj legionoj komenditaj de Princo Jozefo Poniatowski. Jen kion skribas tiama gazeto: „Pasinta registaro ne volis, ke polo sciui tion, kiom ĝia malklerulo aŭstria. La registaro devigis la redaktoron publiki la artikolojn en lia gazeto ofendantajn Napoleonon kaj la samlandanojn.

14 VII de 1809 j. alproksimiĝis al Krakovo la polaj militistoj. Post la batalo kun aŭstria garnizono, aŭstria generalo Mohr proponis batalhalton, dum kiu oni decidis ke morgaŭ je 6-a h. ellros aŭstriaĵoj el Krakovo. En venonta tago matene je 6-a h. eniris tra ĝis hodiaŭ konservita pordego de S-ta Floriano pola armeo, entuziasme salutita per la loĝantaro: Vivu Napoleono! vivu Poloj! Vespere oni iluminis la urbon. Per la lerta cedado kun la eniro en la urbo, oni savis multe da greno kiun Aŭstriaĵoj povus fajrege bruligi.

Dum 3 tagoj oni iluminis la urbon, sur la urbodomo oni fiksis la alegoriajn surskribojn.

20—XI oni festis la nomtagon de Napoleono per la diversaj militaj ekzercoj apude de Krakovo sur la kamparo. Je 5-a h. posttagmeze oni festenis en la Draphalo; je 10-a oni aranĝis samloke la balon. Kiam 19 XI 1809 alvenis polaj legionoj al dekstra flanko de Vistulo oni salutis ilin per pafado el pistuloj, per la iluminado de la urbo. En fenestroj oni metis francajn kaj polajn aglojn kun la cifero de Napoleono. Sur iluminitaj arkadoj sur la ponto oni laŭdis Napoleonon, saksan reĝon kaj Princon Jozefon Poniatowski.

14 I. 1810 oni festis la unuigon de Krakovo kun la Varsovia Princlando. Dum tiu festo unu el krakovaj burĝoj ordonis donaci el siaj keloj al ĉiu soldato duonon da litro de hungara vino. En oficoj oni uzis jam polan lingvon.

7 III 1810 oni festis la nomtagon de Varsovia Princo.

20 VI 1810 oni donis al Krakovo rajtojn de libera komerca urbo, laŭ kiu la komercaĵoj enirantaj en tiun urbon estas liberaj de limimpostoj.

15 IX oni enkondukis Napoleonan kodekson. Ĉiuj korpusoj pretermarŝis sur la ĉefplaco antaŭ la generalo Biegański, kriante „Vivu Napoleono!“.

Post meso la episkopo benis la novan kodekson.

25 VIII oni enkondukis polajn monerojn.

Venis la jaro 1812 kaj la marŝo de Napoleono kontraŭ Moskvo. Departamenta ĵurnalo sub la dato de 28 VI 1812 sciigas, ke oni arestis 16 forkurintojn kiuj vagantaj tra la lando deprenis armile de la loĝantaro la bezonan por si nutraĵojn. Urbprefekto ordonas ilin kapti. 1 VII 1812 gazeto anoncas la dekreton de Napoleono en Wilkowszki komenciĝanta per la vortoj: „Dua pola milito komencita“.

5 VII 1812 oni festis la fondon de la konfederacio de Naciaj Rezentantoj. La popolo kunvenis por legi ĝojan sciigon. Prezidanto de la urbo en mallongaj, sed entuziasmaj vortoj parolis pri la reviviĝo de politika sendependeco kaj la popolo interrompis tiun paroladon per la krioj: vivu Imperiestro, Reviviganto de nia nacio! Vespere oni iluminis la urbon. Civila Tribunalalo havis sur sia pordego portreton de Napoleono ĉirkaŭitan per la rozoj kun versa subskribo.

12 VII oni petis la publikon kunporti la bandaĝojn por vunditaj homoj.

2 VIII oni celebris la meson por elpeti la venkon al armeo.

19 IX oni festis tre lukse la naskiĝtagon de Napoleono. En teatro oni ludis la venkon de Grodno. Sur multaj domoj oni vidis bildojn de imperiestro kun la versaĵoj, egz. Ĝoju filoj de Leĥ, ke vi estas Poloj — Dio estas kun Napoleono, Napoleono estas [kun ni.

Sur termonteto de Krakus oni imitis vulkanon dumnokte per bareloj en kiuj brulis la peĉo.

La nacio avido atendis sciigojn el Nord-Oriento. Fine ili venis; komence de 1813, en Januaro alvadis la vunditaj duonkadavroj de polaj militistoj, plenigante la sanigejojn provizore aranĝitajn;

22 IV eliris saĝsa garnizono el Krakovo.

30 IV Ĝenerala Konsilantaro „vidas sin devigata fermi la kunsidojn“, ĉar malamikaj armeoj eniris en Polujon.

Ĝ16 V eniris jam en Krakovon rusa generalo Sakin.

7 VIII oni ordonis al la loĝantaro fordoni la armilojn.

Tiela estis la kroniko de sinsekvantaj okazintaĵoj: Nune ni rigardu la karakteron de la urbo, dum ĝi havis neniam fabrikojn, nek la komercon. Hebreoj vendis la rubandojn kaj kudriilojn. Mielon kaj la vakson oni vendis en Prusujo kaj eĉ en Italujo. Bele prosperis la bankistoj. En la tago de S-a Johano alvenis multe de nobelularo en la urbon; ĉiuj ĉambroj estis

dungitaj. En teatroj oni ludis malbone en germana kaj pola lingvoj. En la urbo estis nek unu bona botisto. Botistoj senkulpigas sin per malbonaj tanejoj, sed la kulpo kuŝas iliaflanke. Same kun lignajistoj kaj seruristoj. Multaj estis sukerajejoj anstataŭigantaj la kafejojn. Nacia industrio floris en la brodarto. Estis bonegaj tajloroj. Mankis bonaj vojoj, kaj la polica gardo. La poliestro zorgis ekscii nur pri tio, pri kio oni parolas en la urbo kaj ne pri tio, kio efektive okazis. 200 lanternoj po 15 florenoj lumigis nokte la stratojn. Kraków posedis bonegajn vinojn kaj 3 librejojn el kiuj 2 germanaj, unu pola. Pro severa cenzuro ne povis disvastiĝi la gazetoj.

Aŭstria regado estis tre severa. Ŝanĝiĝis tamen ĉio post eniro de polaj legianoj. Princo Poniatowski ekzercis la armeon, kaj la franca ambasado por delurni la atenton aranĝis diversajn ludojn dum malproksime atentis la kozakoj. En kaso mankis la mono, en sanigejoj estis malordo, nokte oni elportis kadavrojn, perdante ilin survoje. Tre mizera estis tiam la stato de detruita Krakovo. Nur malgranda urbo restis el iama floranta riĉa rezidejo de polaj reĝoj, kaj servis nun sole kiel hotelo por trapasantaj armeoj kaj kiel la momenta stacio por diplomatoj kaj aliaj eminentuloj veturantaj aliloken.

Antoni Czubyński.

Scienco kaj vivo.

La regno de libroj.

Eble tio ŝajnas al ni stranga, sed plej multe oni legas en... Australio. En unu el kajero de „Book Monthly“ ni trovas tre intere sajn detalojn. Preskail ne ekzistas tia kabano eĉ plej malproksima de kulturaj centroj kie ni ne trovas verkojn de anglaj klasik-verkistoj. Eĉ en plej malgranda urbeto ekzistas publika legejo kaj biblioteko; la ĉefurboj—krom tio—regnakoste ekzistigas senpagaj publikaj bibliotekoj, al kiujn ĉiujare malavare subvencias lokaj parlamentoj.

La bibliotekoj estas enireblaj por ĉiuj sen escepte — do ĉiu povas ricevi librojn kiujn ajn li volas.

Krom tio funkcias multegaj libropruntejoj privataj kaj tre disvastigita tipo de „flugantaj“ bibliotekoj, kiuj dissendas librojn en la provincon: eĉ en plej malproksimajn land-angulojn oni sendas 300 volumajn librokompletojn plej legantaj, kiujn post ioma tempo oni ŝanĝas forsendante alian kompletan. En vilaĝoj loĝ-

antaro pruntas librojn en lernejoj, bibliotekoj. Amantoj de legado fondis multajn klubojn speciale dediĉitaj al legado; la kluboj venigas eĉ plej multekostaj kaj maloftaj eldonaĵoj.

Australian malsaton de legado kvietigas multaj librejoj. La fama librejo de Kolla en Melbourne estas vera mirindaĵo — unika en la mondo. Tie trapasas miloj da homoj ĉiutage; ĉiuj, tute libere serĉas en faskegoj de libroj sen ia kontrolo, elektante tion, kio al ili plej plaĉas. Multaj tiaj klientoj pasigas tie tutajn tagojn kaj neniu devigas ilin aĉeti por ilia kontrabanda legado. La firmo de Kolla havas multmilionan spezon nekompareblan kun tiu de amerikaj aŭ europaj librejoj.

Do ni vere sen trograndigo povas nomi Australian la regno de libroj.

Tute flanka demando:

Samideano, kiom Vi elspezas por esperantaj libroj — ĉiujare?

La respondon ne diru laŭte — ĉar Vi devus ruĝiĝi.

lingva anguleto.

Ĉu „lgi“ aŭ „l“?

Demando: Ĉu oni devas diri: *ravigi, interesi, amuzigi, dolorigi, suferigi*, aŭ *ravi, interesi, amuzi, dolori, suferi*? *B. B.*

Respondo: Ne estas ĉi tie spaco kaj taŭga okazo por la pritraktado de tiu temo ĝenerale. Tial, por tamen respondi la demandon, mi donos kelkajn ekzemplojn pri la plej ĝenerala uzo de la cititaj verbojn.

Ravi: La rozodoro ravis ŝin. Ravita de tiom da afablaĵoj, ŝi diris... La bongusta, simpla vestaĵo ankoraŭ pli ravigis ŝiajn ĉarmojn.

Interesi: Tiu libro interesas lin; li estis per mi interŝigata pri la libro. La gazetoj interŝigas malmulte pri la afero. Neniu interŝigas lin sufiĉe pri ĝi. — Li estas interesata ĉe la entrepreno.

Amuzi: La stranga, saltetanta besto amuzis rigardantojn. Fraŭlino, kiel vi amuziĝis tiun vesperon? De kiu vi estis amuzata? En la arbaro oni povas bone amuzi kaj distri sin, eĉ se neniu amuzanto ĉeestas. La bestresisto mem ne amuzas la rigardantojn, li ja tute ne estas interesa kaj amuza homo; sed li amuzigas la ĉeestantojn per siaj bestoj.

Dolori: Ŝia kapo doloras. La kugletrafita brako doloras; la kuglo dolorigis ĝin. Kio doloras al vi? La kapo. Kio dolorigis ĝin? La skuado de l' vagono.

Suferi: La malsato suferigas la homojn. Ili suferas pro ĝi. Per la morto de sia edzo la virino suferis grandan perdon.

Pri la vortoj, faritaj el la suprecititaj, mi ne volas nun paroli, kiel mi jam supre diris, kvankam la afero ŝajnas al mi sufiĉe simpla; mi nur atentigas, ke el la supraj ekzemploj ne sekvas, ke la substantivoj de tiuj infinitivoj prezentas *aktivan* agon. Ekz. „mia amuzo“ ne nur estas amuzado, kiun mi faras al iu, sed povas same esti amuzado, kiun alia faras al mi. Plue „amuza“ ne estas speciale „amuzanta“, sed simple „rilata al amuzo“, egale, ĉu aktive aŭ ĉu nur koncerne.

Pri la lasta parto mi devas tamen rimarkigi, ke ĝi prezentas mian pure-nure personan opinion, kaj kvankam ĝi estas konforma al la uzado ĝenerala kaj al la Fundamento, tamen ankaŭ aliaj opinioj ne estas malebligataj de ĝi.

Pri „-grafi“ aŭ „-grafii“.

Demando: Oni diras „fotografi“, „telegrafi“, „litografi“ ktp.; kial oni ne ankaŭ diras „stenografi“ anstataŭ „stenografii“? *H. B.*

Respondo: Iom malnova demando, de la Akademio ne ankoraŭ decidita. — En la Fundamento, § 32, vi povas legi: „Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem“. — Ĝeneraligante tiun ĉi regulon, oni povus diri: La grekdevenaj vortoj finiĝantaj je -matio, -kratio, zofio, -logio, -nomio, -fonio, -grafio, -steno ktp. signifas la abstraktan ideon, la respektivan arton, sciencon inklinan mem; forlasante el la radiko la literon -i, ni ricevas la funkciiganton, la portanton de tiu abstrakto“. — Tiu funkciiganto, praktikanto de la abstrakta ideo estas jen persono jen aparto; laŭ tio ni ricevas ilon aŭ ulon, kaj en kelkaj okazoj duban ideon: „fonografo“ estas sendube aparato, ĉar la sonskribanto estas sendependa de la homo; „stenografo“ povas esti nur persono; „fotografo“ estas duba, ĉar kvankam ankaŭ la aparato funkcias, tamen ankaŭ la persono ludas la rolon de fotografianto, ĝuste dum la efektiva ago.

Sed ĉiuokaze la -grafo estas konkreta; por ricevi la agon respondan, mi devas almeti -as, -is, -os ktp., respektive por la substantivo -ado'n; sed ĉar estas neesence, ĉu mi faras la agojn, kiujn faras stenografo, aŭ ĉu mi praktikas stenografion, mi povas diri egale ĝuste, ke mi stenografas, aŭ stenografias; same oni ja diras: la reĝo reĝas, kaj li reĝas.

Observante tiujn konsiderojn, oni facile alvenos al sekvantaj serioj:

stenografio, fonografio, telegrafio, fotografio; stenografo, fonograf(i)isto (kiu laboras pri la aparato, aŭ kiu praktikas tiun arton), telegraf(i)isto, fotograf(i)isto); steno-, fono-, tele-, fotograf(i)ado; steno-, fono-, tele-gramo, fotograf(i)ajo aŭ kelkfoje fotogramo; stenograf(i)ilo, fonografo, telegraf(i)ilo, fotograf(i)ilo.

Ĉe la vortoj ne finiĝantaj je -grafi' la malfacilaĵo tute ne aperas, ĉar oni parolas nur pri la substantivoj, do: diplomatio, -mato; aristokratio, -krato; astronomio, -nomio; grafologio, -logo; neŭrastenio, -steno; poliglotio, -gloto ktp.

Se ekzistas ankaŭ la aga ideo, kiel ĉe „filozofio“, oni povas kompreneble egale bone diri:

filozofi aŭ filozofii.

Atentante la supre montriran vojon, laŭ kiu la vortoj estas formitaj, oni ankaŭ sen malfacilajo trovas la malgrandajn nuancojn, kiuj kelkfoje aperas inter la du formoj, speciale ĉe la adjektivo. Oni certe sentos la diferencon inter filozofa kaj filozofia verko, inter steno-

grafa kaj stenografia kalendaro. — Sed ni ne perdiĝu en detaloj.

Do konklude: oni povas tute bone diri ankaŭ „stenografi“, sed oni per tio ne lasu sin forlogi kaj ne diru „stenografisto“, same kiel oni ne diras „reĝisto“, „pastristo“, kvankam ili „reĝas“ kaj „pastras“. *Laiŭ „Germ. Esp.“*

Universala Esperanto — Asocio (U. E. A.)

Kiel la lastan jaron U. E. A. faris statistikon de la servoj plenumitaj de la Delegitoj dum 1911. Jen la kompara stato de la servoj dum 1909, 1910 kaj 1911:

	1909:	1910:	1911:
Komerco:	1120	1513	2698
Junuloj:	218	402	528
Turismo:	650	681	1252
Servoj al vojaĝantoj:	628	1110	1704
Diversaj Servoj:	940	3756	4295
Sumoj:	3556	7462	10475

Movado de la korespondajoj de la De-

legitoj:	5754	16651	19075
Ĉe la Centra Oficejo:	—	23940	34355
Gazetartikoloj pri UEA.	326	6063	863
Paroladoj pri UEA.	218	464	547
Esperantaj kursoj:	—	739	1036
Partoprenantoj ĉe la Esp. kursoj:	—	11941	17530

Lail ĉi tiu tabelo oni povas konstati regulan kreskadon de la faritaj servoj.

La etato de la Esperantianoj je la 1-a Julio 1912 estis la jena: 8282 membroj (maksimumo ĝis nun atingita), 309 Esperantiaj Entreprenejoj; 430 membroj de Interŝanĝa fakto; 86 membroj de Laborista fakto; 128 membroj de la Virina fakto.

Oferdonacoj por la konkursoj premioj.

Al ĉiuj oferdonintoj, kiuj sendis al ni monferojn por la konkursoj premioj ni sendas plej koran dankon.

O F E R D O N I N T O.	I-a premio Beletristiko		II-a premio Poezio		III-a premio Scienco	
	Sm.	sd.	Sm.	sd.	Sm.	sd.
<i>Saldo el la antaŭa tabelo</i>	65	02	38	66	63	42
S-o Tadeo Zawadzki el Vilno	—	—	—	—	1	—
Teknikista Grupo de Esperantistoj en Lwów	—	—	—	—	1	92
Esperantisto 8820 el Glasgow	4	—	2	—	4	—
S-o Wł. Hirszowski el Vars.	—	—	—	—	1	—
S-o Koliński el Vars.	—	40	—	20	—	40
S-o A. Stankiewicz el Vars.	—	56	—	28	—	56
D-ro L. Chybczyński el Vars.	4	—	4	—	4	—
S-o Richard Sharpe el Torquay (Angl.) .	2	50	—	—	2	50
Redakcio de „Danubo“	1	25	1	—	2	—
Sume	77	71	46	14	80	80
Mankas por la minimumo de la premioj .	22	29	3	86	19	20
La minimumo de la premioj	100	—	50	—	100	—

* Ensume mankas Sm. 45,35.

Jes, ho tutmonda samideanaro!..

Korespondencjo.

Kiel oni propagandas.

De 7 jaroj mi estas Esperantisto. Ĉe ĉiu paŝo, en ĉiu favora momento mi propagandas... nian ideon, nian lingvon... Bedaŭrinde ĉe ni, Poloj, propagandado devas esti laŭta, atentiga kaj novpensriĉa. Tamen mi provas ion kontraŭan, nome propagandadon silentan kaj ŝajne malfruktodonan. Unu el krakovaj esperantistoj rakontis al mi, ke kelkfoje sidante en kafejo li enmetadis en ilustritajn gazetojn ŝlosilojn de Ĉefeĉ kaj poste atentadis, kio fariĝos kun ili, kian impreson faros je trovanto de ili vortoj: „kun helpo de tiu-ĉi ŝlosilo oni povas kompreni kia ajn tekston esperantan“. Kaj kio okazis? Ilustrita gazeto venis en aliajn manojn de ne-esperantisto, kiu ĝin fojumas... Li trovas ŝlosilon, pririgardas ĝin kaj tre maldiligente, nevolonteme komencas legi. Baldaŭ afero ŝanĝiĝas tiel, ke ŝlosilo pereas en poŝo de kafeja gasto. Ĝi estas propagandilo, kiu certe faros sian servon. Provu samideanoj, propagandado ne tro multekosta kaj amuzo agrabla!

Ĉiumonate venas al mi „Pola Esperantisto“.

Mi zorgo detranĉas kovrilon, en kiu estas sendata gazeto, kovrilon kiu enhavas tre bonan propagandan tekston: Co to jest Esperanto? Mi ĝin prenas kaj ĉu en tramveturilo, ĉu en kafejo mi lasas ĝin al blinda sorto... Laboro malgranda kaj efiko: jam estos sufiĉa.

Mi tiun propagandan rimedon rekomendas al samideanoj en tiuj lokoj, kie ankoraŭ neion aŭ ne tro multe oni scias pri Esperanto!

Lwów. Finiĝis jam kurso, gvidita de S-ro Wierzchowski. Multaj gasamideanoj forveturis jam por libertempo. La Estraro de „Societo Eperanto“ elektis jam Rajtigitajn Delegitojn: 1) D-ro Szczepan Mikołajski, 2) Hieronim Wierzchowski, 3) Benedykt Herold, 4) S-ino Fels.

Kiel Rajtigita Delegito de „Teknikista Grupo de Esperantistoj“ estos S-ro Giercuszkiwicz. Al Kongreso veturos de Lwów 50 gasamideanoj, bone uzantaj nian lingvon.

En *Jarostaw* dank' al penadoj de S-roj Ostrowski kaj D-ro Gerstler oni povas esperi, ke tiea „Societo Esperanto“ reviviĝos.

Władysław Giercuszkiwicz.

F a k t y.

Na cześć D-ra L. L. Zamenhofs.

— Rada miasta Tarrasa w Hiszpanji—przysłała D-rowi Zamenhofowi oficjalny dokument datowany 17/VI 12 r. i opatrzony № 827 a pisany po esperancku, o treści następującej:

Znakomity Paniel (Eminenta Sinjoro!)

Mając na względzie niezaprzeczalnie wielki krok naprzód, który dzięki Panu uczyniła idea postępu, pokoju i braterstwa ludów na podstawie Pańskiego pięknego i łatwego języka Esperanto, Rada miasta, któremu przewodniczę, na posiedzeniu w dn. 5 czerwca powzięła jednogłośnie decyzję nadać sławne imię Zamenhof jednemu z istniejących placów miasta Tarrasa, jako dowód uznania dla szczęśliwie zrealizowanego przez Pana—wielkiego dzieła. Chcemy wedle możliwości uwiecznić imię wielkiego męża, który umiał zasłużyć sobie na wieczną pamięć — tworząc węzły braterstwa ludów i obdarowywując nimi wszystkie pokolenia świata.

Oto wszystko, co chciałem zakomunikować Panu wypełniając wolę mego miasta. Pozwalam sobie przesłać Panu pełne szacunku i szczerości pozdrowienie. Niech Bóg zachowa Cię na długie lata.

Tarrasa, 17 Czerwca 1912 r.

Prezydent
(podpis nieczytelny)

